

Manda Prismo



1
1961

Lastmomente informis la komitato loteria pri la ĵus okazinta lotado inter 150 bonaj amikoj — unuopuloj aŭ kluboj — kiuj oferis variajn sumojn por la akcelo de Norda Prismo. Ni varme dankas ĉiujn, kiuj kontribuis al la afero kaj informas, ke la ĉinan uron gajnis n-ro 12. (Laborista Klubo Stockholm.) Oni lotis ankaŭ kelkajn malpli grandajn premiojn, entute estis do 7 premioj. La ceterajn gajnis la numeroj 11, 98, 4, 68, 50, 8. Ses premioj restis en Svedlando, dum unujaran abonon de N. Pr. gajnis sro A. Prince, 112 Rychby Mead. LETCHWORTH (Herts) Anglujo. La aliajn gajnintojn ni informas aparte.

Gratulon al la gajnintoj kaj dankon al ĉiuj. Loteria komitato: T. Julin, K. Ullström, A. Moberg.

NORDA PRISMO

*Kultura, socia, literatura
revuo, dumonata*

Ĉefredaktoro:

Ferenc Szilágyi, Döbelnsgatan 66,
BORÅS. (Tel. 244 22.)

Redakcio:

Baldur Ragnarsson, (Reykjavik),
Johan Hammond Rosbach
(Sarpsborg),
Vilho Setälä (Matinkylä),
Poul Thorsen (Kopenhago).

Ansvarig utgivare:

Yngve Nilsson.

Administrado:

Barnhusgatan 8, Stockholm

Abonprezo:

10:— sv. kr. (25 intr. rkp., 2:— us dol. 29 steloj.) Unuopa numero 2:50 sv. kr. (6 int. rkp.) Abonu ĉe la administrejo per poŝteka konto 15 54 80 aŭ ĉe la landaj esperanteldonejoj-libroservoj.

Anoncoj:

1/1 paĝo 50:— sv. kr., 1/2 p. 30:—, 1/4 p. 18:—, 1/8 p. 12:—, 1/6 p. 9:—. Korespondaj anoncoj 3:20 sv. kr. (8 int. rkp.)

La redakcejo ne resendas ne akceptitajn manuskriptojn.

J. Baghy: Kiel fariĝis la blanka homo	1
Orienta miraklo	2
Suneklipso — sunleviĝo	3
T. Ditlevsen (W. Nielsen): Ovogrogo	8
F. Szilágyi: Renkonto	8
G. Deŝkin: Tipa lirika poeto	8
A. Logvin: Mi ne kredas	8
Stultaj edzoj kaj trolaj (Chr. Asbjørnsen — H. Fridén)	
Babilo pri J. T. Sergel	11
L. N. M. Newell: Brilega mondo	15
J. Korinek: Doktoro Zamenhof	16
... (B. Darázs): La tri rozoj	17
P. Giunio (M. Ĝivoje): La strategio de la marvulpo	18
L. Böti: Simpla konfeso	20
T. Rozowicz (I. Dratwer): Fremda homo	24
E. Lippe: Mia preĝejo	24
Survoje al 6-hora labortago	25
J. Kawalec: Postsignoj	26
A. Mildwurf: Amliteraturo	27
P. Gombó (J. Némethy) Kiel oni devas progresi	28
J. Heltai (F. S.): La centoj kaj la suno	28
<i>Recenzoj pri Fermentario de C. V. Ferreira, Kvar prelegoj (D. Kralj), P. Giunio: Sekretoj de la marestaĵoj, Avoto: Memuaro, Islanda Statistika verko, 10 gvidprincipoj de Oomoto</i>	29
Novaĵoj, informoj	31

TITOLBILDO

A. Bach: Portreto de verkistino D. Vaarandi

La eminenta estona artistino, A. Bach (n. 1901.) majstre regas la grafikan teknikon kaj ŝia profunde inspirita arto kaj esprimpovo ne povas lasi indiferenta la rigardanton.

Kiel fariĝis la blanka homo?

Negra fabelo

Saluto de la jubileinto al la publiko de
N. P.

*Kiam la Temp' ne havis nomon,
komencon, fazojn, finon,
la Dio kreis — nigran homon
dirante la destinon:*

*"Al vi la bestojn kun ĝangaloj
mi donas nun donace,
eĉ riĉon de la montoj, valoj
por vivi bone, pace.
La paradizo de l' tropiko
al negroj apartenas,
ĝis fraton frate en kunligo
la buŝo, koro tenas."*

*Du fratoj foje el la valo,
kiel ebono nigraj,
ĉasadis kune en ĝangalo
sur vojoj spure tigras.
Gemeloj ili, sed interne
du malaj mondoj estis:
ĉe unu noblo en li ferme
kun bona volo nestis;
ĉe dua ruzo kaj avido
superis ĉian senton,
li pagis fidon per perfido,
neniam havis penton.*

*Rivaloj estis la ĝemeloj,
knabinon saman volis,
sed ŝi dum svataj amkvereloj
nur ridis kaj petolis:
"Mi ne elektos, sed vi sciu,
ties edzin' mi estos,
kiu en ĉaso venkos, kiu
per tigrofel' min vestos."
Kutimo estis tiapreze
akiri la amŝancon;
tial la fratoj ĝangalmeze
ĉasante tenis lancon.*

*L' unua brave kaj ĉasarde
inter lianojn paŝis;
la dua ruze, tre singarde
post frata korp' sin kaŝis.
Subite ega tigro saltis
sur dorson de la dua;
je helpokri' sinturne haltis
lin savi la unua.
Li per la lanco, sed batale
la tigrokoron trafis,
gajninte ŝancon eĉ lojale
la fratan vivon savis.*

*Sed danka sento en animo
de l' dua morte dormis;
instige lin al aĉa krimo
ĵaluzo murda ŝtormis.
Dum senfeligis sian predon
la ŝancgajninta frato,
la dua ŝteli ĝin rimedon
priplanis sen kompato
kaj postrestinte tuj kruele
mortpikis lin per lanco
kaj sinvestinte tigrofele
jubilis pro amŝanco.*

*Li hejmeniri sin preparis
sen konscienciproĉo,
kiam mem Dio vojon baris
kun fulmotondra voĉo:
"Ah, kion faris al la frato
ci, aĉa kaj maldanka?"
Li sen respond' kun timtremado
paliĝis krete blanka.
"Cin stigme puni perdu signe
la nigron de l' ebono!"
Dum tion diris Di' indigne
fariĝis — blanka homo.*

TRA NIA PRISMO

I.

ORIENTA MIRAKLO

Tio povus esti la esp. titolo de dana libro. Aŭtoro: Hakon Mielche, vera mondmigranto, kies libroj jaron post jaro aperas krom la dana ankaŭ en la aliaj skandinaviaj lingvoj, germane, angle, france, ĉeĥe kaj nederlande. La menciita libro dankis sian naskiĝon al iniciato de UNICEF kaj ĝi prezentas nekutiman vojaĝpriskribon de lokoj, kie ĉiukoloraj kuracistoj kaj iliaj ofte indiĝenaj helpantoj kune batalas kontraŭ la komunaj malamikoj de la homaro — t. e. lepro, tuberkulozo, kaj aliaj sennombraj malsanoj.

Mielche apartenas al la klarvidaj optimistoj. Li observas klare, neniam li havas respekton al fantomoj, kiel ajn gigantaj ili estas. Tio donas al liaj priskriboj eĉ, kiam la temo estas tragedia, en siaj detaloj iun specialan logon kaj riĉon de koloroj kaj eĉ humoro kreskas sur la surfaco de la grundo, kies grizmalpuron formis la stulto kaj kulpoj de la pasintoj.

Estus interese paroli pli detale pri tiu ĉi vojaĝlibro, sed momente ni haltu ĉe ties amara "post-skriba" ĉapitro citante kelkajn rimarkojn pri la argumentoj, kelkfoje aŭdeblaj kontraŭ la humana laboro de Unicef kaj la San-Mondorganizo. "Ĉu ili ne scias, ke ĉiu infano, kiu saviĝas el la ungoj de la tuberkulozo, lepro kaj ĥolero, partoprenos en la kompleta formanĝo de la mondo?"

Mielche respondas: "Estas facile esti krudhaŭta kaj cinika — precipe kiam la infano, kiun oni mortigas per

eleganta manmovo, vivas ie sur la alia flanko de la terglobo.

Sed kiel mi scias ankaŭ Italujo, Belgujo kaj Nederlando suferas pro troloĝateco."

— — —

Jen denove la malnova historio pri la 40.000 dronintaj ĉinoj, kiujn oni mencias sur la 4-a paĝo de la loka gazeto, dum la viro, kiu kontraŭveturas lamp-foston en la propra ĉefa strato, ricevas ĉeftitolon kaj ĉion sur la unua paĝo.

Jen primitiva manko de senso al la tuto — manko, kiun ni devus perdi en nia jarcento. Tio apartenas al la epoko de la grotloĝantoj, ne al tiu de la flugmaŝino, radio kaj televido, kie finfine la distanco signifas nenion. Ni tute preteru tion, ke tia cinikeco venas en seriozan konflikton kontraŭ la kristana instruo, sur kiu niaj civilizo kaj kulturo laŭdire estas konstruitaj."

Iom poste Mielche venas al la temo, de la sociaj postuloj ĝeneralaj:

(La mondorganizo) "scias, ke la popolkresko en iuj partoj de la mondo iĝas tro granda en rilato al la postulo de nia klera epoko pri certa vivnivela minimumo, higienaj postuloj kaj sano, kiujn ni fiksas kiel minimumon al la XX-jarcentaj socioj.

Per la moderna higieno kaj la novaj miraklomedikamentoj la homkvanto kreskas maltrankvilige en la subevoluintaj landoj...

Familia plansistemo estas neevitebla.

La infankvanto devas esti barita tiel, ke ĉiu naskito povu havi ŝancon en la socio, kaj neniu estu kondamnita jam ĉe la naskiĝo je malsato kaj malsano aŭ manko de laboro, kiam ĝi plenkreskas.

Tia planado puŝas sian frunton kontraŭ la muron en tiuj landoj, kie ĝi estus la plej aktuala. En multaj landoj la abundo de infanoj estas sekurigo por la gepatroj — la sola formo de aĝpensio kaj asekuro kontraŭ akcidentoj, la sola, kiun ili konas.

Ne malmultaj religiaj institucioj havas nenian intereson pri tio, ke la mondo tropleniĝas kaj ke la homoj

vivas en mizero, nur gravas, ke la eklezio povu kalkuli pri kreskanta nombro de membroj.

Kaj iliaj okuloj vidas ruĝe, kiam oni ekparolas pri familia planado kaj preventivrimedoj.”

Mielche vidas ĉiujn facetojn de la problemo, kies esenco estas, ke *ĉiu deka tago signifas unu milionon pli da homoj en la mondo.*

Kion oni faris kaj kion ne faris por batali kontraŭ tiu problemo, pri tio senpartie, kun akra kritika povo kaj observo parolas la aŭtoro. Kiel li, reala optimisto, vidas la estonton de la problemo, pri tio ni revenos pli poste.

II.

SUNEKLIPSO – SUNLEVIGO

Jen freŝe ricevita bela, ilustrita, bonstila, E-lingva ekstra eldono de la Kroata "Malgranda Scienca Biblioteko": TOTALA SUNEKLIPSO 15/11 1961, verkita de d-roj M. Ljubic kaj G. Divjanoviĉ; la laste menciita estas direktoro de la Astronomia Observatorio, Opatička 22. Zagreb, kiu kun seriozuloj volonte havas kontakton pri la aferoj priskribataj. La valoran scian parton (ankaŭ en angla, germana tradukoj) kompletigas aliaj informoj atentindaj de tiu ĉi valoro kaj bela eldono (32 p.).* Ni provu koncize rakonti nur kelkajn el la faktoj, citante (preskaŭ) nur titolojn de la ĉapitroj en la libro: Junaj astronomoj ambaŭseksaj ekverkis libron (romanforman) pri hidrogenbomba milito. Dum la verkado ili kontaktiĝis kun la ideo de Esp., poste mem kun la lingvo. Ili esperantistiĝas. La kolektiva romano

Havigebla kontraŭ esperantaĵo (vortareto, k. s.) aŭ nacilingva ne-granda verko pri astronomio.

iĝis unika sukceso. Baldaŭ aperos ĝia E-traduko (trad. Ivo Rotkviĉ!) kaj jam nun, post la unuaj informoj la libro promesas tradukojn tre multloke eksterlande. La 25 amindaj gebravuloj verkis jam ankaŭ filmscenaron, originale E-an, kaj la "Tragedio de la Universo" atendas sian filmigon. Ili faras ĉe la Observatorio regulajn prelegojn en E. kaj sugestis enkosme eternigi la nomojn "Zamenhof" kaj "Esperanto". Ili ekfunkciigas propran, pure E-lingvan radiostacion. Por pensi ankaŭ pri la libertempo, en la sama, bela kolektive homa spirito nun ili fondas "Esperantujon" por doni feriejon al similuloj en belega marborda regiono ĉe la Adriatiko (urbeto "Primošten" — vera perlo, vidu la bildon en la libro!) Tien ili invitas vin por tendumo aŭ hotelumo.

Nia longa suneklipso, kiam ni provis lumigi per modestaj meĉoj, baldaŭ finiĝos kaj reekbrilos la suno de la ravaj junaj fortoj. Tiel estos!



L. Harkai: Lepra-kolonio

La ampleksa sveda socia helpagado por la lepruloj, inspiris la artiston de la supra artaĵo. Ankaŭ ĉiloke ni citas kelkajn vortojn el la "Orienta miraklo", kiuj konkrete sensigas, kiom signifas la helpo:

"Han" (t. e. la kuracisto) "estas dio en la vilaĝoj, la viro kies manoj kuracas la plej terurajn vundojn kaj kies kunhelpantoj savas la vivon de homoj, kiuj jam havas la stampon de la morto sur sia deformigita haŭto."

OVOGROGO

Dana verkistino (n. 1918) kun profunda socia kaj psikologia senso.

La infano staris ĉe la koridora ŝtuparo per ambaŭ manoj sur la balustrado, sin apogante, senmove aŭskultante al la pordo, kiu malfermiĝis tie malsupre, kaj al foraj paŝoj, kiujn ŝi imagis esti tiuj de la patrino, ĝis ili haltis du etaĝojn sube, kaj la fermo de pordo detruis la esperon denove.

Nun Hansen en la tria etaĝo revenis hejmen, kaj Ketty el la sodfabriko, kaj la edzino de hejtisto Henriksen, kiu laboris en Carlsberg kune kun la patrino, kaj kiu kompreneble venus por rakonti, se io estus okazinta. Sed eble ŝi ne havis koron por tio, aŭ ŝi tutsimple ne sciis. Preskaŭ ĉiutage la ambulanco signalis tra la stratoj kun iu ajn — kaj la fabriko estis tre granda.

En sia maltrankvilo ŝi tretis forte sur siaj propraj piedfingroj kaj restis longe tiel starante, por ke la larmoj, gutante peze en la kelon, ekhavu evidentan kialon. Estis tiel ĉiutage depende de la daŭro de la prokrasto de la patrino. Ŝi ĉiam stariĝis je sia aŭskulta deĵoro iom pli frue ol oni ekzakte povis atendi la revenon de la patrino.

Sia blanka vizaĝo lumis malklare kaj senmove kvazaŭ ŝirmita lampo en mallumo. Malantaŭe fermita pordo al la kuirejo. Mallaŭte vezikumanta sono de bolantaj terpomoj. En la malgranda ĉambro la tablo estis aranĝita por du. La floranta geranio staris meze sur la vakstolo kaj ĉiam ridigis la patrinojn pale kaj kutime, ĉar florpoto staru sur la fenestra breto kaj ne sur la manĝotablo.

Tuj kiam la infano ĉesigis sian fortan prenon sur la balustrado kaj sidiĝis sur la plej supra ŝtupo tute rezigne kaj laŭte plorante, kvazaŭ por montri al la sorto, ke ŝin ĝi jam elprovis sufiĉe, kaj ke ŝi nun povus toleri iomete da sukceso, ŝi aŭdis la pordegon malfermiĝi kaj laŭta nedifinebla sono, eble nur skrapo de ŝuo sur la trotuaro de la korto instigis ŝin eksalti kaj kuri en la kuirejon por eklumigi la lampon kaj estingi la gason sub la terpomoj en febra, neesprimebla ĝojego: Panjo venas! Nun ŝi metas la biciklon en la biciklejon, nun ŝi kuras supren laŭ la ŝtuparo, pli kaj pli proksimen. La mondo pleniĝas de lumo, la koro de trankvilo.

Ŝi staras dorse al la pordo kaj kun la hararo kvazaŭ du nigraj flugiloj ĉe la vangoj, ŝutante la vaporantajn terpomojn en teleron, kiam la patrino envenis frapfermante la pordon.

— Fi, kia malvarmo!

— Mi jam fritis la frikadelojn, panjo, nur ni varmigu ilin.

Sia voĉo estis raŭka kvazaŭ voĉo de knabo pro frua puberteco. Ŝi ne estis multe malpli alta ol la patrino, sed magra kvazaŭ malsana hundo, ĉar ŝi zorgis sola pri si la tutan tagon. La vizaĝo estis malgranda kaj senfine ĉagrena kun pinta mentono kaj griza nesana haŭto. Nur la okuloj lumis, grandaj, malhelbluaj kaj seriozaj en la malbela vizaĝo.

La patrino ne respondis al la vortoj pri la frikadeloj, kaj entute ili ne plu parolis sidante ĉe la tablo. La patrino kun pala, dolĉa rideto en sia ŝminkita vizaĝo prenis la ĉion superombrantan geranion de sur la tablo kaj remetis ĝin sur la fenestrobenkon. Denove sidiĝante, ŝi tuŝetis la sensŝir-

man lampon, kiu svingante faris ombrojn sur la kolorperdinta tapeto.

Ŝi manĝis rapide, kun du profundaj sulkoj inter la mallargaj deŝiritaj brovoj. La paliĝinta hararo havis nedifineblan fundkoloron kaj estis senbrila, kiel la lacaj, miopaj okuloj. La tagoj estis tiom egalaj dum la lasta deko da jaroj, ke ŝi apenaŭ rimarkis la ŝanĝon de sia vizaĝo. Ruĝo sur lipoj kaj vangoj, malpura pudropeniko super tio kaj glitigo de nigra broseto tra la maldensaj okulharoj. Antaŭ la spegulo en griza matenlumo la tempo ŝajnis halti kaj ĉiu tago esti kiel la antaŭa. Se la ruĝo estis elĉerpita, ŝi aĉetis novan skatolon, kaj ekzistas sufiĉe da pudro en la mondo por eterne blankigi ĉi-tiun detruitan vizaĝon, same ekzistas sufiĉe da soifaj viroj en la mondo, por ke la fluo de malplenaj boteloj por purigo glitu sian senkompatan transportvojon, pli longe ol ŝiaj rapidaj manoj eblos preni kaj purigi ilin. Oni povus nomi ŝian ekziston trista, sed kiam ŝi plendis pro ĝi, malpli estis pro tio, ke ŝi konsciis pri ĝia tristeco, ol tutsimple pro kutimo, kaj ĉar ja estas bona moro plendi pro ĉio. Fakte ĝi ja ankaŭ estis tre sekura pro ĉiu-ĉi pudro kaj ĉiuj-ĉi soifaj viroj, kaj kelkfoje tio eĉ estis bona — pro la infano, al kiu ŝi nur malofte parolis.

Dum ŝi manĝis, la infano senĉese rigardis ŝin. La patrino foriris matene pli frue ol ŝi vekigis, kaj nur restis ĉituij valoraj horoj antaŭ enlitiĝo por kunesto.

La infano ne memoris sian patron. Maristo ĉiam estas nur gasto en sia propra hejmo, kaj cetere ŝi havis nur tri jarojn, kiam ŝi lastfoje vidis lin. Ŝi malamis lin same neeviteble kiel la patrino. Eble tion kaŭzis nur konvencio kaj kutimo: "Tiu fripono", diris la virinoj en la Carlsberg-bierfarejo kaj en la ŝtuparejo, kaj "li ne

kuraĝu reveni ĉi-tien" superis ilin la patrino. Sed la malamo de la infano estis muta kaj devenis de la protekta amemo, kiun ŝi sentis al sia patrino.

Post la manĝo ŝi reformatis la manĝilaron kaj purigis la telerojn. La kuirilaron ŝi nur tralavos la postan tagon reveninte el la lernejo.

Sur la kuireja tablo kuŝis la monujo de la patrino ne fermita, kaj kelkaj moneroj kuŝis sur la tablo. La rilato de la infano al mono estis miksiĝo de respekto kaj amareco. Pro tiu mono ŝia patrino forestis la tutan tagon, ĝi estas kulpa pri senfina multhora laboro, angoro kaj soleco. Ĉiu oero kostis iom da forto patrino kaj iom da vidpovo de ŝiaj trostreĉitaj okuloj, detruitaj, ĉar ŝi ĉiam devis teni la botelojn al la lumo por rigardi, ĉu ili estas puraj.

Ŝi estis nur malgranda, demandanta la patrinojn, kial ŝi foriris labori, ja estas multe pli agrable resti hejme. Tiam ŝi eksciis, ke panjo laboras por havigi al ili manĝon kaj vestaĵojn, kaj dimanĉe la infano ĉagrenite demandis, ĉu ili ne havas manĝaĵon hodiaŭ, ĉar panjo restis hejme.

Ŝi iom miris, ke la monujon ŝi metis tiel senzorge sur la tablon, kaj rapidis preni ĝin. Ŝi komencis reenmeti la monerojn en ĝin, kaj subite rimarkis, ke la patrino staras malantaŭ ŝi. Ŝi ekskuigis, ĉar ŝi ne aŭdis ŝin veni. Konfuzite ŝi metis la monujon, forŝovis la harojn el la vango per la antaŭbrako kaj renkontis fremdan suspektan rigardon de sia patrino. Ŝi brule ruĝiĝis kaj fikse rigardis patrinojn per vaste malfermitaj okuloj, kio plenigis la rigardon de la patrino per kolero, post tio per spito kaj necerto, ĝis ombro de honto transglitis ŝian vizaĝon, kaj ŝi ne plu eltenis tiun simplenan rigardon, sed fortunis sin per duone embarasita, duone ekscita movo kaj reiris en la ĉambron.

La infano restis senmova ĉe la monujo kaj la malpuraj teleroj. Si ŝpiris rapide dum la pensoj stumblis malantaŭ ŝia pala frunto: "Si kredis, ke mi volas ŝteli, ŝi kredis, ke mi volas preni monon de ŝi — eble ŝi kredas, ke mi jam antaŭe faris tion. — kvazaŭ mi ankoraŭ ne kostis al ŝi sufiĉe — se nur tiu monujo ne estus kuŝinta tie — se nur ĉio estus kiel antaŭe — Kara Dio, estu kiel antaŭe — faru tion ne okazinta.

Kial vi restas tie? kriis la patrino el la alia ĉambro. La voĉo estis ekscita kaj fremda kiel ŝiaj okuloj antaŭe, kun malmola sono de ofendo kiel defendo kontraŭ pento kaj amemo, kiun ŝi neniam kapablis esprimi. Si prenis ŝtrumpflikaĵojn el la bufedo malantaŭ la tablo kaj fine metis ĉifonon super la akrelumanta ampolo kaj sidiĝis antaŭ la makulita tablotuko. Prenante ŝtrumpon ŝi ekrigardis ĝin, kvazaŭ ŝi mirus, ke unu ŝtrumpo povas havi tiom da truoj. Si aŭskultis maltrankvile al la kuirejo kaj ekhavis turmentan mienon ĉirkaŭ la kruza ŝminkita buŝo. Ŝi ne aprobis, ke okazis io speciala, sed maltrankvilo kreskis en ŝia koro, kvazaŭ kiam besto sentas danĝeron kaj rigardas, aŭskultas renkonte al ĝi.

Tiam ŝi vokis la infanon per milda, stranga voĉo, sonanta al ŝi mem fremda. La infano envenis kaj sidiĝis kontraŭ ŝin kun nedifinebla lumo de espero en la magra vizaĝeto; same ŝi staras sur la ŝtuparo en malhelo imagante, ke la paŝoj aŭdeblaj, estas la paŝoj de ŝia patrino, ĝis la pordo frapiĝas en alia etaĝo.

— Nun ŝi diros ion, ŝi pensis.

La silento de la ĉambro doloris. Ŝi rigardis nerveze la malrapide tiktakantan horloĝon, kvazaŭ ĝi per sia bruo povus haltigi la savontajn nekonatajn vortojn, ŝvebantajn ĉirkaŭ la lipoj de la patrino. Neklare la infano

sentis ke tiuj strangaj, antaŭe diritaj vortoj, devos veni de la patrino, ne, ĉar ŝi estis malprava, sed ĉar la infano ne mem povis diri ilin. Ŝi ne povis diri: "Mi ne ŝtelis", unue ĉar tio evidentigus la aferon, kaj oni neniam poste povus imagi al si, ke nenio okazis, due ĉar la samajn vortojn povus uzi ŝtelisto — neniu povus malebligi al ŝi uzi la samajn vortojn, ŝe ŝi vere estus ŝtelinta ion. Estis tiu nova — ankoraŭ ne formulita — vero, kiu mortigis ion en ŝi kaj malfermis terurajn perspektivojn pri la maljusto, poste fareblan kontraŭ ŝi. Kun kunpremitaj lipoj ŝi rigardis la buŝon de la patrino. Tiujn ege ruĝajn kaj krudajn lipojn, kiuj malofte tremis pro ploro, kaj kies liniojn neniam moligis amemaj kaj amaj vortoj. La rapide kisitan kaj forgesitan buŝon de fabriklaboristino.

Si daŭre rigardas la ŝtrumpon, kvazaŭ forgesinte kion fari pri ĝi, kaj sentas la silenton de la infano kiel doloron kaj ekruniĝon de la bonaj rilatoj inter ili. Ŝi ne tute scias, kio okazis, sed la mizero de la infano atingis ŝin laŭ vojoj nekonataj, sekretaj. Senhelpe la pensoj kruciĝas en ŝia cerbo. Ŝi ne scias, ke tiun, kiun oni amas, oni ĉiam povas helpi. Ŝi rigardas supren kaj renkontas la rigardon de la infano. Kaj ŝiaj okuloj estas plenaj de peto kaj teruro, kvazaŭ ŝi mem estus infano, kiu per mallertaj manoj puŝis multekostan vazon planken.

Fine ŝi tusas kaj diras mallaŭte:

— Vi ja povas miksi al vi ovogrogon.

Kaj ŝi rigardas la palan, pintan vizaĝon malŝtreciĝi kaj ekridi, kiam la infano eksaltas kaj kuras en la kuirejon sur siaj longaj, rektaj kruroj.

— Ankaŭ vi havu unu, panjo, mi volonte miksas du.

Tiam ŝi trankvile ekflikis la ŝtrumpon. El la dana: *W. Nielsen*

Renkonto

Al Julio Baghy (13/1, 1961)

*La sun' demetis la vualonigron,
purpuron spiris ĝi sur vintran puron
kaj haltis; kio signus do la migron,
dum ni bobenas fazojn, tempon,
kuron.*

*Ŝoseojn longajn bobenas nia sorĉo,
is kaj as kaj os tuj estos alvenontoj,
sur alto lumas flamo, lumotorĉo.
Ni pontkreintoj jam mezase ĉe la
ponto.*

*Ĉu oni diros: jen, nur vine-vane
sensencas maljunuloj sin-eskape,
babilas pri sorĉoj, tempoglut' —
malsane,
dum straba lumo ebriaĉas kape —
eĉ sen aldono de l' abstrakto deca
ili umas ŝajnkorekte, kulte —
ne, tio estas eĉ ne problemeca:
nur klaron serĉi en la klaro — stulte!*

*Sed nin kunigas varmo de ĉi vintra
posttagmezo, la silent', soleno.
Ĉu diri multon? Gvidas muto nin tra
tempa longo sen la tempa ĉeno.
Jam la spaco malaperis tute.
Diri ion? Kion diri? Flaton?
Danku, ĝojo ni nur en dankemo, mute
sur la pint' — renkonte Anim-
Araraton.*



Tipa liriko poeto

Al L. T. (Folieto)

Georgo Deŝkin, kies 70-jaran naskiĝtagon ni gratulas nun, (23/2) havas multajn kordojn sur sia liuto. Sed liaj plej bonŝancaj poemoj estas la subjektive lirikaj kiel la jena. Deŝkin estas sovetiano, esperantisto jam pli ol de 50 jaroj. Lia poemaro "Elektitaj versaĵoj" kompletigis la bildon pri atentinda lirikisto, kiun oni konis ĝenerale laŭ la poemoj aperintaj diversloke. Adreso: Miĉurinsk, Tombov obl., Vokzainaja 149, USSR.

*Ho, kiel inspiris min ĝojo momenta!
versajne neniam mi estos prudenta,
kun deco kaj saĝo,
konvenaj al aĝo,
kaj kun mienaĉo pedanta . . .*

*Sed ĉiam mi restos facile flirtanta
de floro al floro,
laŭ vol' de Amoro,
kun koro ŝanĝema,
kun vers' faciltema —
tipa lirika poeto! . . .*

Ĉu ti a mi plaĉas al vi, Folieto?

Aleksandro Logvin

Mi ne kredas

*Revo naskas la realon,
tamen ĝi ne estas rava . . .
Oni diras ke en valo
floras ĉarma flor' agava.
Mi ne kredas . . . Suno dia!
Montru vi al mi angulon,
kie povus koro mia
vivon trovi sennebulan.*

STULTAJ EDZOJ KAJ TROLAJ

Laŭ P. Chr. Asbjornsen.

Foje du edzinaĉoj kverelis, kiel kelkfoje faras edzinaĉoj, kaj ne havante alion pri kio ili povis kvereli, ili komencis kvereli pri siaj edzoj, pri tio, kiu el tiuj estas la pli stulta. Ju pli longe ili kverelis, des pli koleraĵi ili fariĝis. Fine ili preskaŭ elŝiris la harojn unu de l' alia, ĉar vi sciu, ke estas pli facile iniciati malpacon ol pacon, kaj estas malbone, kiam mankas la prudento. Unu el ili diris, ke ne ekzistas unu sola afero, kiun ŝi ne povus kredi al sia edzo, se ŝi diras, ke tiel estas; ĉar li estas facilkreda kiel la troloj. Kaj la alia asertis, eĉ se temas pri kiu ajn idiot-aĵo, ŝi igus sian edzon fari ĝin, dirante ke tiel estu; ĉar li estas tia, ke li povas trovi nek kudrilon nek fade-non.

"Jes, ni provu, kiu el ni povas pli bone mistifiki ilin, por vidi, kiu estas la pli stulta", ili fine diris, kaj pri tio ili interkonsentis.

Kiam do unu el la edzoj venis hejmen el la arbaro, lia edzino diris: "Dio gardu min, kiel vi aspektas! Vi certe estas malsana, se ne mortonta".

"Nur mankas manĝo kaj trinko", diris la edzo.

"Dio pardonu min, se mi ne diras la veron!" kriis la edzinaĉo; "certe vi pli kaj pli malsaniĝas, vi aspektas preskaŭ kiel mortinto vizaĝe. Vi devas enlitiĝi! Ho, tio ĉi ne povas longe daŭri!"

Tiel ŝi daŭrigis, ĝis ŝi kredigis al sia edzo, ke li estas tute proksima al la morto. Ŝi igis lin ekkuŝi, interplekti la manojn kaj fermi la okulojn. Poste ŝi lin etendis, sur mortliton metis kaj enĉerkiĝis; sed por ke li ne sufokiĝu dum li kuŝas tie, ŝi lasis fari

kelkajn truojn en la tabuloj, tiel ke li povu spiri kaj elrigardi.

La alia edzinaĉo eksidis kun du kardiloj kaj komencis kardi, sed ŝi havis neniun lanon sur ili. La edzo envenis, rigardante tiun ĉi farson.

"Estas malmulta helpo en pafilo sen ĉano, sed kardiloj sen lano estas rekta profano", diris la edzo.

"Sen lano?" diris la edzinaĉo, "ĉu mi ne havas lanon? Sed vi ne vidas ĝin, ĉar ĝi estas el la plej delikata speco", ŝi diris.

Finkardinte ŝi elprenis la ŝpinilon kaj komencis ŝpini.

"Ne, estas tro absurde", diris la edzo, "vi ja detruos vian ŝpinilon, se vi ĝin turnas, havante nenion en ĝi".

"Nenion en ĝi?" diris la edzinaĉo, "la fadeno ja estas tiel delikata, ke devas esti aliaj okuloj por vidi ĝin".

Fininte la ŝpinadon, ŝi volvis sur varpotrabon, aranĝis la teksilon, varpis kaj bobenis, kaj teksis la drapon. Poste ŝi elprenis ĝin el la teksilo, fulis kaj altranĉis, kaj kudris vestojn el ĝi por sia edzo, kaj kiam ili estis pretaj, ŝi pendigis ilin en la subtegmento. La edzo povis vidi nek drapon nek vestojn, sed li nun ekkredis, ke ili estas tiel delikataj, ke li ne povas vidi ilin, kaj fine li diris:

"Jes, jes, se tiel delikataj ili estas, do ili certe estas tiel delikataj".

Sed subite iun tagon diris al li la edzinaĉo: "Hodiaŭ vi devas iri al enteriga festeno, ĉar la bienulo en Nordkamparo veturas teren hodiaŭ; kaj tiam vi devas surmeti la novajn vestojn". Kompreneble li volis iri al la enterigo, kaj ŝi helpis lin surmeti la novajn vestojn, ĉar ili estas tiel delikataj, ke li povus disŝiri ilin, se li helpus sin mem.



Sergel: Portret-medaliono de J. H. Kellgren

Kiam li venis al la funebranta bieno, ili jam trinkis kaj multon kaj fortajn aĵojn tie; kaj la funebro certe ne fariĝis pli granda, kiam ili vidis la viron en la novaj preĝejaj vestoj! Sed kiam ili iris, procesie al la tombejo, la mortinto elrigardis, kaj vidante la viron, li subite ekridegis.

"Ne, nun mi devas ridegi", li diris, "ĉu ne iras Ola de Sudkamparo nete nuda al mia enterigo!"

Aŭdante tion, la sekvantaro ne heditis depreni la kovrilon de la ĉerko, kaj la viro kun la novaj preĝejaj vestoj demandis, kial la funebrato kuŝas

babilante kaj ridante en la ĉerko: certe estus pli bone, se li plorus! "Ploro prenas nenium el la tombo", diris la alia. Sed fine ili ekkomprenis, ke estas la edzinaĉoj, kiuj okazigis la tuton. Poste la edzoj iris hejmen, farante la plej saĝan aferon, kiun ili iam faris, kaj se estas iu, kiu volas scii, kio tio estas, demandu al Majstro Betulvergo.

El norvega popolfabelo tradukis

Henry Fridén

Gloso: *Trolo* fabela, arbara estaĵo, kruda, peza, ne-lerta, kelkfoje malica.

BABILO PRI JOHAN TOBIAS SERGEL

Johan Tobias Sergel (1740—1814) estis granda skulptisto, grafikisto, kiu konservis viva per siaj skulptaĵoj, reliefoj, plumportretoj kaj karikaturaj la multfacetan vivbildo de la XVIII-a jarcento.

Lia mecenato estis la art- kaj literatur-adora sveda reĝo, Gustavo III. — La dinasto konfuzis ĉiujn — escepte la artistojn kaj verkistojn de sia rondo, kiuj vivis en vera Arkadio kaj apenaŭ povis senti ion alian, nur raviĝon al la reĝo; — entute oni povas diri, ke en la kaoso jen utila reformlaboro, talentaj ekbriloj, danĝeraj aventuroj, nekredbla facilanimo kaj fine senkondiĉa absolutismo —

konstante kun la ĉeesto de la bohemiaj kaj amindaj karaktertrajtoj alternigis intermite la sentojn de la popolo. Pri tiu ĉi ŝanĝigema efekte en kadroj de mallonga artikolo supozeble nenio estas pli karakteriza (krom la ilustraĵoj de Sergel) ol la lerneja skribtasko de iu anonima, nuntempa knabo, kies skribaĵo montras, ke io nesolida vibras eĉ en la historia kritiko, kiam temas pri la "Ĉarma Reĝo" (kiu cetere estis fama ankaŭ pro siaj virinaventuroj):

"En la parlamento de 1789" skribas la juna historiisto "Gustav III estis malamata de la sveda popolo. La 16-an de marto 1792, oni havis mas-



Anna Rella kaj la eta Gustav Sergel (1795)



Sergel: Statuo de Gustavo, la III-a, fondinto de la Sveda Akademio, mem poeto.

kobalon. La reĝo kriis: "Mi estas vundita!" La amikoj de la reĝo tuj fermis la pordojn. Ili devis demeti siajn maskojn kaj diri siajn nomojn. Lia vundo ne aspektis danĝera, sed li tamen baldaŭ mortis. Li havis tre grandajn dolorojn. Li estis tre ŝatata en siaj lastaj minutoj. Unuflanke la vizaĝo de Gustavo estis bona, sed aliflanke la frunto estis oblikva kaj enpremita. La plej granda ĉagreno de Gustavo estis, ke li ne fariĝis karaktero."

Tiu, kiu fidele adoris eĉ la memoron de la talenta kaj kaprica reĝo, estis la kortega skulptisto Sergel, mem bohemo. Li vivis laŭ la maniero de korteganoj de tiu jarcento, sed li havis pli fidelan koron, kion pruvas, ke la tri homojn, kiujn li amis kaj perdis, la junan virinon, kiu sen edzi-

niĝo estis patrino de liaj infanoj, la reĝon, kiu ĉiam escepte favoris la svedan "Fidiason" kaj sian amikon la artiston, inĝenieron, generalon Carl A. Ehrenswärd — ĉiujn tri li funebriĝismorte. Tio estas despli atentinda, ĉar la multe pli juna virino mortis 18 jarojn antaŭ la artisto, kiu nek pli frue nek poste retiriĝis de erotikaj aventuroj. Lia vivo estis plena de ŝanĝoj, vojaĝoj, studoj, aventuroj, festenoj — kaj malsano (podagro, artikeŭmatismo) jam de relative juna aĝo. En la paŭza tempo de liaj pli kaj pliĝintaj plagoj li festenis, havis plezurojn kaj dikiĝis, ĝis la morto finis la lastan kaj ne facilan parton (tamen neniam malfeliĉan) de lia vivo. Li estis tiam 74-jara.

Post la morto pasis jam preskaŭ 150 jaroj, sed lia klasika kaj sam-



Sergel: Gallodier — 61-jara — dancanta "pas de deux" en la Drottningholma teatro la 7-an de okt. 1794.



Sergel: Carl Michael Bellman

Brilega mondo

Sur strat', en ora lum' — aĥ, kiom
ofte! —

Aŭ en la gaja bruo de kafejo,
Abrupte la brilega mond' splitiĝas.

Parfumo preterfluas;
Kliniĝas — ĝuste tiel — fremda kapo;
Aŭ vort' eĥadas tra memortuneloj
Al sia hejmn'.

Pensombro glitas sur la glata hulo
De la animo, forviŝante brilon
De tiu marspegul'; vidiĝas treme
Teneraj formoj en profundo.

Tiam la ora mond' nigriĝas vidon,
Kaj l'gaja bru' de l'homoj, muĝ'
obtuza,
Pulse tamburas kiel vundo, sensignife.

Disiĝas disten lumo, sono, penso;
Kaj ni vertiĝas suben
En la mallumon de l'paseo,

Abismo kies fund' radumas
Per ŝiraj dentoj de doloro.

Tiam horor' plenigas l'universon,
Ĝis spasma dolor' finiĝas kaj nin
lasas
En la tenebro droni.

Droni: forgesi: la ravo de neesto . . .

Nur kurta paco; baldaŭ
La mond' alsuĉas nin denove;
La mens', ankoraŭ senfokusa, pensas
Bruerojn kaj lumsplitojn kunpecigi,
Por rekonstrui ŝirmspegulon, kaj
forkaŝi
La hidan kernon de la vivo.

Glosoj:

diste malproksime (Kvarsopo)
paseo pasintaĵo (Kv.)
tenebro mallumaĵo (Kv.)
hida forpuŝe malbela (Kv.)

tempe tute aktuala arto ne perdis sian freŝecon. Liaj klasikaspektaj statuoj, liaj amasaj portret-skulptaĵoj same, kiel la grafikaĵoj, kiujn li verŝis el si sur paperojn en leterojn, kaj al kiuj ni povas danki, ke krom la verkojn, ni konas ankaŭ verkistojn laŭ ekstero, la genian trubaduron, la vin-amanton Bellman, (ne tute sen tragikaj trajtoj), la elegantan poeton Kellgren; la neforgeseblan reĝon, la amatan amikinon de la artisto Ulla

Rella kaj multajn, multajn aliajn de tiu vigla kaj paradoksa epoko; eĉ per kelkaj — ĉiam malgrasaj figuroj — kampulojn aŭ metiistojn, kiuj certe vivis iom pli senfestene ol la alta boHEMA rondo, kie Sergel pasigis siajn tagojn en la plej memorinda parto de sia vivo. Ni povas danki tutan kulturhistorian ĉapitron al la genia, reviviga kaj profundvida talento de la artisto.

Doktoro Zamenhof

Daŭrigo el 5/6 1960.

Ses vivajn lingvojn juna li jam
sciis krom greka kaj latin'.
Okupis la studenton tiam
la stranga fakt' kaj kaŭzdifin',

ke plurajn lingvojn hom' bezonas
kaj malfacilajn eĉ pro spit',
mi ĝuste elektis, vi rezonas,
kaj vian scion trafas rid'.

Ke perde tempon ni dediĉas,
fine komprenas fuŝe nur,
kaj de subeco ne seniĝas,
dum ni parolas kun fremdul'.

Nacia lingvo virĉevalo
belas, sed plenas de kapric',
malsimplas ĉiu samegale,
vin rezistante kun malic'.

La riĉvarion superbatas
neceltaŭgeco per atut',
kaj tiu prezo nin ŝokadas
ĉe lingvo por homara tut'.

Pri ĝi studento gimnazia
sciis kaj meditadoj tre,
eldiris ĝin jam vir' alia,
ne estis nova la ide'.

laŭ plano novan lingvon fari
el lingva stok' de mondpopol',
ĉe ĝi sintrompe ne erari,
ke plenumblas ĉies vol'.

Facilan lingvon neŭtralan,
ĉies la duan en soci',
se vi ĝin uzas, baroj falas,
hom' estas mi kaj homo ci.

Ekprovis ĝin en Panglotio
la granda ĉeĥa instruanto'.
Pri tiu prov' de Komenio
ĉu danke scias lia land'?

Ne vane revis Ludoviko,
super projekt' sin klinis nuk',
junaĝon prenis al perdigio
labor' prilingva kaj traduk'.

Kaj en licea oka klaso
lingvonaskiĝa sonis fest',
lingvon post centa provtrapaso
nur maturigis plua kresk'.

Sed patro ne samopinia
por tempo interrompis lin,
ĝis post la stud' por profesia
dononta panon laŭ destin'.

La filo estis ekekononta,
ke l' vivo estas ne ludil',
eĉ per plenfort' ke oni frontas
al vivinsid' kun malfacil'.

En Varsovi', Vien' kaj Moskvo
preparis sin la kuracist',
al kiu taskis sortagnosko
servi eĉ tra mizerinsist'.

Ĉe malriĉuloj Varsoviaj
kuracis li kaj la mizer'
lia sin miksis kun iliaj
en filantropa sinofer'.

Sed per edzin' por elektitoj
tiam lin dotis sortfavor',
valora dot' en vivinsidoj:
amik' samtempe kaj trezor'.

De bona Klara dot' malgranda
oferdoniĝis al la pens';
stel' nova de esper' flagranta
ekhelis el genia mens'.

Kaj kiam poste eta libro
diskuris tra Rusuja vast',
de leontod' lanuga fibro
ŝajnis en lud' de venta hast'.

LA TRI ROZOJ

Modesta, sed tamen kontribuo al la intersanĝo de la orienta kaj okcidenta kulturvaloroj... Kazaĥio estas ŝtato en Sovetio kun 2.753.800 km²-a teritorio, pli ol 6 milionoj da loĝantoj. Cefurbo: Alma-Ata (240.000 loĝ.)

Antaŭ longa-longa tempo vivis en Kazaĥio juna kantisto. Oni nomis lin Abajĝan. Lian kanton ŝate aŭskultis ne nur la infanoj, sed ankaŭ la birdoj, eĉ la arboj kaj floroj en la ĝardeno.

Multaj rozoj floris en la ĝardeno de la kantisto. La plej belaj estis inter ili tri ruĝaj rozoj, kiuj pompis sur la arbedo ĝuste ĉe la tendo. Ĉi rozoj ŝatis aŭskulti la kantojn de la kantisto.

Iun nokton, kiam Abajĝan estis ekkantanta sian novan kanton, li ekaŭdis ies sonoran voĉon. Li traserĉis la tutan ĝardenon, sed neniun vidis. La sekvontan nokton okazis same. Iu kantis kune kun la kantisto sed li poste trovis neniun en la ĝardeno.

Alvenis la tria punkto. Ĉi-fojon la kantisto restis en la tendo. Apenau komenciĝis lia kanto, li ekaŭdis denove ies sonoran voĉon malantaŭ la dorso. Abajĝan rapide ĉirkaŭrigardis kaj ĉe la sojlo de la tendo ekvidis belegan knabinon.

Kiu vi estas? Kiel vi konas miajn kantojn? — demandis li.

Mi estas unu el la tri rozoj, kiuj floras ĉe via tendo. Kiam aperas la suno mi denove fariĝas rozo. Jen falis jam la roso — heroldo de mateno... Mi devas rapidi!

Haltu! — krietis Abajĝan. Restu kun mi. Mi volas aŭskulti vian belegan voĉon ankaŭ tage.

Nun mi ne povas resti. Mi mortos, se mi restas. Sed, se vi matene min rekonos inter la tri rozoj, mi iĝos denove knabino. Nur ne eraru! Se vi eraros, mi por ĉiam iĝos rozo. Dirinte tion la knabino malaperis.

Matene Abajĝan aliris al la rozarbedo. Sur ĝi floris tri ruĝaj rozoj, tri perfekte samformaj. Daŭre rigardis ilin la poeto kaj subite ekkrietis, montrante sur unu el la tri: ĉu ĉi tiu estas vi?

Je lia vortoj defalis la ruĝaj petaloj kaj aperis belega knabino apud la arbedo...

Kiel divenis Abajĝan la sorĉitan rozon???

Li rekonis inter la tri samformaj rozoj la transformiĝintan knabinon pro manko de roso sur unu el la tri.

ESPERANTO GRUPO El la rusa: *Bérci Darázs*

CALLOSA DE SEGURA

Kiam en pluaj lingvoj venis Alicante HISPANIO, okon, kiu dura ŝajnas, sekvaj eldonoj de l' verket', kavigas blokon de granit', oni do jam ekkoni emis: bona afer' samtiel gajnas persistos tiu flor' de kred'.

Ĉar en ĉi planto estas vivo kaj sem' de nobla idear' portota plu de venta drivo! Ja gut' per sia daŭra fal'

Ekmute la mokintoj seĝos, lumsepultistoj rampas for, entuziasmo barojn breĉos, al ĝi sukcesos la labor'.

(Finota.)

SEKRETOJ DE LA MARESTAJOJ


LA STRATEGIO DE LA MARVULPO

Ĉi apude vi povas vidi la belan titolpaĝon de tiu ege interesa verko, pri kiu ni aliloke donas recenzon. La suba ĉapitro estas konvena specimeno el la libro, kiu unuigas en si la virtojn de la bonaj popularsciencaj priskriboj, eksterordinare interesaj. Eldonis: Kroatia Esp. Servo sub aŭspicioj de UEA. Prezo: 20 steloj.

Inter la ŝarkoj ekzistas interesa speco, kiu per sia longa vostnaĝilo enportas mortotimon en la animon de banantoj, kaj la fiŝistoj precipe ĝin malamas, ĉar ĝi dispelas la arojn da bluaj fiŝoj. Pro tio ĝi estas prave konsiderata kiel tre malutila por la fiŝkaptado. Pro la jam menciita longa vostnaĝilo ĝi ricevis la nomon *marvulpo* aŭ *marmuso*.

Kvankam ĝi apartenas al la grupo de danĝeraj ŝarkoj kiaj estas la *atlanta lamno*, *longnaza lamno* kaj la tiel nomata *raboŝarko*, ĝi ne estas danĝera por la homo, ĉar ĝi nutras sin grandparte per malpli grandaj, are vivantaj fiŝoj, kiaj estas la haringoj kaj sardinoj. Tamen, ĝia apero kaŭzas timon, ĉar kiam ĝi naĝas surface, el la maro elstaras ĝia alta dorsnaĝilo, kaj en tiaj okazoj ĝi ofte kutimas frapi ankaŭ per la longa vostnaĝilo, produktante sonojn, similajn al vipobatoj.

Tuj oni rimarkas, ke la marvulpo estas treege svelta kaj rapidmova fiŝo. Precipe evoluinta estas ĝia antaŭa



korpoparto, kiu posedas grandajn brustnaĝilojn kaj la unuan dorsnaĝilon. Sed plej longa — preskaŭ kiel la tuta korpo — estas la supra vostnaĝilo. La muzelo estas malgranda kaj konusforma, kaj ĝi entenas tri kvar vicojn da triangulaj dentoj. La marvulpo atingas la longecon de 5 m, sed oni kaptis ankaŭ pli grandajn ekzemplerojn.

Ĉar ni jam koniĝis kun la ekstera aspekto de ĉi tiu ŝarko, nun ni vidu kiamaniere — laŭ la citaĵoj de iuj observantoj — ĝi kuratakas aron da

fiŝoj. Temas pri speciala strategio, ĉe kiu plej multe helpas ĝuste la longa vostnaĝilo. Jen kiel lerte la marvulpo faras tion: rimarkinte aron da malpli grandaj fiŝoj, ĝi komencas rapide rondnaĝi, svingante senĉese per la vosta naĝilo por malebligi ilian diskuron. La fiŝojn ekkaptas tia timo, ke ili panike ĉiam pli kunpremiĝas. La marvulpo daŭrigas cirkuli ĝis la aro tute kunbuliĝas. Tiam ĝi fulmrapide ekatakas kaj komencas manĝegi la fiŝojn. Dume la ceteraj fiŝoj diskuras, sed la rapida kaj ruza marvulpo, denove cirkaŭas ilin, ripetante siajn strategiajn atakojn ĝis plensatiĝo. Laŭ tio ni vidas, ke la longeco de la vostnaĝilo ĉe la marvulpo ne estas hazarda, sed vere bezonata.


Kaj kial la marvulpo uzas ĝuste tian taktikon? Ankaŭ tio havas sian kaŭzon. Kiel ni jam vidis, ĉi tiu ŝarko estas sufiĉe granda, kaj ĝi bezonas sufiĉe da nutraĵo por satiĝi. Havante malgrandan faŭkon, ĝi ne povas venki pli grandan fiŝon kaj satiĝi per unu sola glutporcio. Ne restas alio, ol

ataki malpli grandajn fiŝojn, kaj ĝuste tiujn, kiuj vivas arope, por povi per unu atako engluti plurajn kune kaj ripeti la atakojn ĝis plensatiĝo. Cetero, ĝi suferus malsaton, se ĝi devus postkuri ĉiun malgrandan fiŝon. Jen, en tio kuŝas la sekreto de la interesa taktiko de la marvulpo. Sed la nomon marvulpo ĉi tiu ŝarko meritas ankaŭ pro sia ruzeco. Kvankam ĝi estas manĝegema, tamen ĝi scias gardi sin de reto kaj fiŝhoko. Kelkfoje ĝi trompiĝas, sed tamen ĝi rapide elturniĝas kaj lastmomente savas la vivon. Kiam ĝi eksentas, ke ĝi enmordis fiŝhokon, ĝi alrapidas al la fadeno, tramordas ĝin kaj forkuras. Pli bone vivi kun fiŝhoko en la buŝo, ol perdi la kapon!

Reverkis en E. M. Givoje

Glosaro. *Lamna* (lat. lamna): grupo de manĝavidaj ŝarkoj, atingantaj pli ol 3 m. da longo. *muzelo*: antaŭa, elstara, pintiĝanta kapoparto de fiŝoj.

Obs! Ilustrita karto kun la bildo de la tre bona titolpaĝo kostas 1 stelon. Mendebla kie la libro.



SIMPLA KONFESO

Nova nomo, pedagogo en mezlernejo, tre esperiga forto, kiel movada gvidanto kaj kiel prozisto.

Ĉu vi konas N, tiun ĉi urbeton en la orienta landparto? Se ne, vi perdis nenion. Ĉi urbetoj terure similas unu la alian kaj certe vi jam vidis tiaspecan vilaĝegon, kun unusola pavimita ĉefstrato, koto aŭ polvo sur la aliaj ĝisgenue, laŭ la sezono; tri preĝejoj sur la urbocentra placo kaj trifoje tri drinkejoj; kino, aro da grizaj, seninteresaj homoj, enuo . . . enuo . . .

Jarojn mi vivis tie — sed vi ja ne konas min, vi eĉ ne povus imagi, kiel mi suferis en tiu urbaĉo. Sed ne temas pri mi kaj estas superflue plendi. Jam delonge mi forlasis ĝin. Nun temos pri la sola homo, kiun mi renkontis en tiu kotujo kaj kiun mi ankoraŭ ne forgesis.

Tuj vi aŭdos, kial.

Li estis inĝeniero, la nomo ne gravas. Ni amikiĝis rapide kaj sen ia ajn signifa okazo. Cetere mi amikiĝas tre malfacile. Mi havas nur du-tri amikojn: ĉiuj miaspecaj, neplibonigeblaj maljunaj fraŭloj, kiuj opinias la geedziĝon eltrovo de la diablo kaj ofte ili fanfaronas, per kiaj ruzaĵoj ili evitis la reton de la ina gento. La ideala kunvivo de la inĝenier-familio tamen kortuŝis eĉ min kaj foje-foje mi pripensadis, ĉu mi ne faris stultajon, kiam mi — antaŭ 30 jaroj — tiu knabino — eh, negrave! Egale jam . . . kaj mi promesis rakonti pri la inĝeniero, ne pri mi.

La inĝeniero gvidis la konstruon de la kanalo kaj — ĉar ankaŭ la prizorgadon kaj inspekton de la kanalo oni

konfidis al li — ekloĝis en la urbo. Laŭ sia ekstero li estis ĉiutaga, griza hometo, mezastatura, 35—40-jara, kun okulvitroj, kaj hararo jam iom maldensa, sed ne griziĝinta. Li havis superkritike grandan kaj ampleksan scion, ne nur en sia fako, sed ankaŭ krome li estis surprize erudicia, tamen modesta kaj ĝentila; mallonge tia, kiun oni nomis iam "ĝisplanda sinjoro". Mi nomas lin simple: homo.

Ni ambaŭ ege malŝatis la t. n. "socialajn formalajojn". Ni renkontiĝis ie, paroladis kaj — ĉar ankaŭ mi vidis ion el la mondo — bonege komprenis unu la alian. Ofte mi vizitis ilin preskaŭ ĉiutage kaj tie mi ekkonis "hejmon" en citiloj, pri kiu kantas la poetoj. La inĝeniero, lia edzino, preskaŭ dek jarojn pli juna blonda virineto kaj la du filinoj formis kompletan unuon. La domon plenigis la paco, harmonio, trankvilo kaj kompreno. Estis vere resaniĝo por mi ŝanĝi mian solecon por unu-vespera restado ĉe ili kaj vidi la feliĉon regantan en tiu familio.

Mi povas diri: mi estis ilia amiko. Intima amiko mi tamen ne estis. Neniam ni intime interparolis, krom unu fojon, ankaŭ tiam nevole kaj ĝustetion mi intencas rakonti.

Estis komenco de printempo, la lastaj tagoj de aprilo, bela, varmeta vetero. Eble pro tio ni estis iom pli komunikemaj?

Mi vespermanĝis kun ili. Post la manĝo ni restadis iomete ankoraŭ ĉirkaŭ la tablo, ni babiladis, ŝercadis, kiel kutime. La edzino poste formetis la servicon kaj akompanate de la helpemaj filinoj malaperis en la kuirrejo.

Ni restis duope kun la inĝeniero.

En la forno brulis ankoraŭ la fajro kaj en la densiĝanta malhelo la flagranta lumo de la flamoj kreis ian ankoraŭ ne sentitan romantikan humoron.

Dum minutoj ni admiris senvorte la flamludon. Miaj pensoj zigzagas en la estinto kaj estanto, ĝis foje — mi mem ne scias, kiel — vortoj ekverŝiĝis el mi. Mi rakontis la tragedion de mia vivo, kiu ja nur por dudek-jarulo estis tragedio; nun, post pli ol tridek jaroj, ĝi estas nur memoro, eĉ ne dolora. Ĉu aŭskultas min iu, aŭ ne, mi ne pripensis. Mi rakontis kvazaŭ al mi mem la historion malnovan, ŝablonan, tamen belan por mi, ĉar ĝi estas la mia. Vi ja ĉiuj konas la temon milfoje vivitan kaj skribitan: nobla, riĉa familio... bela knabino... bela knabino... malriĉa knabo. Renkontoj sekretaj... rapidaj kisoj... malvolo de gepatroj... adiaŭo... ĵuroj: ĉiam, neniam!... kaj poste... nenio.

"Mi do restis fraŭlo — mi finis — kaj mi ne bedaŭras! — mi almetis kun iom falsaplomba gesto. — Sed de kiam mi konas vin..."

Mi ĉesis. Li eble pensus, ke mi envias ilian feliĉon. Estis ja nur la restaĵo de la juneca romantiko, revekita nekutima situacio.

Silento regis dum momento.

La inĝeniero dum la tuta tempo fiksrigardis la fajron kaj lia lipo ape-naŭ moviĝis ekparolante:

"Nin...?"

La vorto sonis strange, tre strange! Min frapis io ne atendita, kvazaŭ la vorto enhavus amaron kaj malfeliĉon. Mi ne povis diri ion. Ni silentis longe, poste la inĝeniero subite, kazaŭ vekita el sorĉa sonĝo ekĝemis, prenis cigaredon, ekfumis kaj komence balbute, poste pli kaj pli flue konfesis jene:

"Vi do kredas, ke mia vivo estas plena de belo, seninterrompa feliĉo?... Do, vi eble pravas... kion ni konsideras feliĉo? Mi amas mian familion, ankaŭ mia laboro plaĉas al mi... kun la homoj mi vivas harmonie... jes, feliĉo... Sed iam..."

Jam fluis la vortoj el li:

"Vi scias, iam, kiam mi estis ankoraŭ studento, mi estis tre enamiĝinta. Tre enamiĝinta — tio ja estas sensenaĵo! Oni amas aŭ ne amas; mi ne povas gradigi la amon. Sed oni ne filozofadu! Mi estis studento de inĝeniera fako, ŝi estis filologo. Du jarojn pli juna ol mi. Ni konatiĝis... mi ne scias kiel kaj kie. Inter studentoj okazas facile la interkonatiĝo... kaj mi ekamis ŝin."

"Ne, ŝi ne estis bela. Malalta ŝi estis, kun iom kurbaj kruoj... ŝia nazeto estis stumpeta... Miaj kolegoj ofte ŝercis pri mia amo. Sed en ĝi troviĝis ia stranga beleco, ia interna koreco, aŭ altirpovo... mi ne povas esprimi, eĉ tiam mi ne povis, kvankam tiutempe mi preferis la precizajn terminojn."

Iom li ekridetis.

"Mi estis inĝeniero estonta! Do mallonge: mi enamiĝis al ŝi kaj mi ne estis la sola: la duono de la klaso estis miaj samsortanoj. Kaj ŝi elektis min, kvankam jam en tiu tempo mi ne estis belulo."

"Multfoje ni kunestis... ni promeadis kune, paroladis kaj... jes, ni ankaŭ kisadis. Mi estis feliĉa kaj fierra, ne nur, ĉar ŝi amas min, sed — laŭ vere vira maniero — ĉefe ĉar ŝi min amas kaj ne iun, kiu estas pli bela, pli saĝa ol mi, kiun si ankaŭ estus povinta elekti."

"La afero daŭris du jarojn, escepte nature la libertempojn, kiam ni forlasis la urbon kaj ni ambaŭ — almenaŭ mi certe — nombris la tagojn ĝis la nova studsezono."

"Kiel min konfuzis ĉi tiu sento! Juĝu vi mem, vi konas min kaj ankaŭ tiam mi estis la sama: mi verkis poemojn! Aĉajn poemojn. Sed ili plaĉis al ŝi kaj krom ŝi neniu sciis pri ili. Niaj kolegoj, ankaŭ inĝenieroj, trovis iom ridinda jam ankaŭ mian amon en la mondo de la logaritmoj kaj kompakt-moduloj. Mi verkis, notis, laŭlegis la poemojn, donis ilin al ŝi, ĉar ŝi petis kaj mi ne bezonis ilin. Ŝi promesis, ke ŝi montros ilin al neniu. "Ili koncernas nur nin, samkiel niaj kisoj" — ŝi diris.

"Tiel ni vivis dum niaj universitataj jaroj. Poste mi finis la studadon, mi forlasis la urbon kaj vetkuregis por la ĉiutaga pano. Honte, sed vere: ni devas antaŭe manĝi kaj nur poste ni povas ami.

"Ni priparolis nenion, interkonsentis pri ĥenio plua. Eĉ unu vorto ne estis pri geedziĝo, miaopinie tio estis natura, alie ne povas okazi, se unu amas la alian. Mi devas trovi postenon kaj ni devas atendi, ke ankaŭ ŝi finu la studadon. Ŝian adreson — en la universitata urbo — mi konis kaj foje mi skribis al ŝi. Tiutempe mi vagadis en Francujo, do ŝi ne povis respondi."

"Oni diras, la amo malpliigas proporcio al la distanco kaj tempopaso. Ĝible, sed mi estas esceptulo. Eĉ unu komon mia sento ne aliiĝis, mi amis ŝin same, kiel antaŭe, kiel iam ajn, nur mi kutimiĝis al tiu ĉi amo. Ĝi apartenis al mia vivo, iĝis parto de mia mio, same kiel — se estas permesate uzi tian komparon — la ĉiutaga lego de la ĵurnalo. Ĝi iĝis kontinua sento, jam ne sentata. Se oni havus dentodoloron ekde sia naskiĝo, neniu kredus, ke dento povas dolori, aŭ la mankon de la doloro oni rigardus malsano. Strange, ĉu ne?"

Li gestis kvazaŭ forigante muŝon.

"Denove mi filozofadas. Kion mi

rakontis? Jes! Pasis la jaroj. Mi laboris, pensadis pri ŝi kaj mi sentis certege, ke ankaŭ ŝi faras la saman."

"Poste alvenis la konjunkturo, vi scias, la "ora epoko". Mi akiris sufiĉe bonan kaj ĉefe konstantan postenon en la hejmolando. Mia unua sento estis: ŝi. Nur nun mi konstatis, kiel malmulton mi scias pri ŝi! La vizaĝon — jes, tion mi povus desegni precize, se mi sciis desegni, sed ŝian adreson, nu, la adreson de ŝiaj gepatroj mi ne sciis. Nur la nomon de la urbeto — en la orienta landparto. Mi skribis leteron adresitan sen strato kaj numero: nek respondo venis, nek la letero revenis. Mi havis nek tempon por esplori, nek monon por esplorigi kaj mi jam rezignis. Mi ja estas tia: tre facile mi rezignas anstataŭ batali."

"Kaj unu tagon en la ĵurnalo mi legis pri konkurso por printempaj amversajoj. La plej sukcesaj aperis en la ĵurnalo kaj mi — vi scias — kiel pasia leganto, legis ankaŭ tiujn. La tria aŭ kvara, je mia plej granda surprizo, estis unu el miaj farajoj! Eraro neeb-la, nenia dubo: mi ja konas la proprajn poemojn. Kaj ĝi, la "Simpla Konfeso", estis mia plej kara ido."

"Nepre mi devis konstati, kiu sendis la poemon? Se ŝi estas tiu, mi trovos ŝin. Se ne . . . do ankaŭ tiam mi scios kion fari."

"La versaĵoj aperis anonime. Mi skribis al la redaktoro, poste mi persone vizitis lin: li rifuzis doni klarigon antaŭ la fermo de la konkurso. Ses monatoj ankoraŭ! La premio estas dumonata sumerumo ĉe la Mediteraneo por du personoj, sufiĉe granda sumo, mi komprenu . . .

"Mi komprenis. Post longa kaj persista petado li promesis peri leteron al la ensendinto. Tuj mi skribis: la amaj sentoj ariĝintaj dum jaroj nun ŝvebis, plenigis la paĝojn: konfeso,

peto, riproĉoj kaj denove konfeso ...”

”... la letero ekiris. Dum la sekvantaj semajnoj mi estis kvazaŭ somnambulo. Mi atendis la respondon kaj samtempe mi temis ... Ĉu ne ĉio estis superflua? Mia vivo jam preskaŭ enordigis ... eble, verŝajne ankaŭ la ŝia ... kaj nun ... se ĉio renversigos? ... ĉu inde? ...”

”... sed la letero jam ekiris ...”

Li ekhaltis momenton, kvazaŭ serĉante la rememorojn. Li fumsuĉis la cigaredon, kiu estis jam preskaŭ elbrulinta, elspiris la fumon kaj longe postrigardis ĝin. Mi atendis la daŭrigon nervostreĉe, preskaŭ mi ekkriis: ”Do? Estis ŝi?” — sed mi bridis mian senton.

Post iom da tempo li parolis plu.

”Pasis preskaŭ du monatoj, ĝis respondo venis. Mi kredis, mia koro krevos, kiam mi rigardis la literojn konatajn sur la koverto. Eble horojn mi sidis apud la tablo, antaŭ mi la letero, ĝis mi ekhavis kuraĝon malfermi ĝin.”

”Jes, ŝi estis. Ŝi, ŝi. Ŝi sendis la poemon, ŝi ne donis ĝin al aliulo, ankaŭ nun ŝi gardas ĝin kune kun la aliaj, kun niaj memoroj. Ŝi ne forgesis min, neniam ŝi forgesos, ŝi atendis min, eĉ nun ŝi atendas, ŝi amas min, ĉu mi volas iri al ŝi ...?”

Fine do! mi ĝemis profunde. Nu, stultaĵo, mi ja estus povinta imagi la finon, nature ”happy end”, mi ja vidis la finalon, ĉi tiun feliĉan familion.

”Vi povas ĉesi, amiko. Vera romano! Do, tiel vi retrovis vian amatinon, vian edzinon. Vi ja estas feliĉulo, maljunulo ...”

La inĝeniero nun alrigardis min unuafoje dum la rakontado. Forte li fumsuĉis la cigaredon kaj returnis siajn okulojn al la fajro jam cindriĝanta. Dume la krepusko kovris la ĉambron per malhelo. Lia vizaĝo ape-

naŭ estis videbla kaj min ekregis ia stranga, malcerta sento. Miaj vortoj gaje ekestintaj stumpe pendis en la densiĝinta mallumo. Mi ne kuraĝis daŭrigi, kvankam mia amiko ne faris eĉ moveton.

Ni sidis tiel, senvorte, dum longaj minutoj kaj mi jam sciis, ke okazos io neatendita.

La inĝeniero fine moviĝis, la cigaredrestaĵon ĵetis en la fajron kaj ekparolis per strange raŭka voĉo:

”La letero ... tiu letero ... alvenis hieraŭ ...”

Emba

La strato

*Ekfajfis akre la lokomotiv' —
La turpa tempo al veturo pretas.
Timide adiaŭas ĝin la viv',
Bukedojn sur la relojn Morno metas.*

*Ekfajfis jen freneze la fabrik',
La fumtubegoj longajn flagojn
svingas:
Rapidu! urĝas por Estont' la brik'
Futuron per hastigo ni atingas!*

*Ekveas frumatene mem la strat';
Ve, ve! Mi ĉiam pro estonto urĝas,
Sed kiam mi atingos — trans la Fat'
Ĝin, kiu min konstante spronas,
skurĝas?*

Glosoj: turpa — malbela, timide = timeme, hasti = rapidi.



Fremda homo

T. Rózewicz — nuna eminentulo pola
kun nuanca kaj profunda esprimkapablo.

Jen fremda hom'
kion li deziras
pri kiu demandas
li nekonato
certe perdis la vojon
aŭ eraris
li diras ke serĉas nin
sed nomojn li ne konas
kiun vi serĉas
tiu ne loĝas ĉi tie
li estas ebrulo
eble frenezulo
li obstinas
ke ĝuste nin li serĉas
sed ni ne konas lin
kiu li estas
Mi ne povas eniri
en vian domon
hejmon
vi diras
ke min vi ne konas
ke mi estas fremda
vi rigardas morne
iom time
Guste vin mi serĉas
en tiu ĉi urb' grandega
kiu kreskas
plivastiĝas
Vin mi serĉas
Sur tiu ĉi insul'
senhoma
mi ne eraris
vi estas
homoj
miaj proksimuloj
ĉu mi povas resti kun vi
unu tagon nokton
mi estas homo
mi ne estas fremda
vi min rigardas
tra pordfenestret'

Mia preĝejo

E. Lippe estas latva poetino, kiu ĵus ek-
verkis ankaŭ en E.

Kial ekscitige koko krias,
hund' timige hurlas ĉe la ĉen'
kaj ĉielo nigra ruĝe strias?
Nokt'. Ankorau' foras la maten'.

Brulalarmo en aer' ĝemegas.
Ekburĝonas sange ruĝa flor'.
Ho, preĝejo mia nun brulegas,
pro teruro kunpremiĝas kor'.

Dia hejm' — per flamoj vualita.
Tremas turo, turo de trankvil',
jen fleksiĝas kruco orgravita,
fandiĝante ĝemas sonoril'.

La benantajn manojn nun mallevas
Krist' sur bildo, super la altar',
nun por ĉiam eksilenti devas
ĉe orgen' kantanta anĝelar'.

Kandelingoj elarĝentaj ploras.
Ploras la kandeloj. Ploras mi.
Sufokante fum' je vaks' odoras.
Aj, preĝejo! Min doloras ĝi.

Avoj ĝin konstruis kaj avinoj
kaj daŭrige ĝin konstruis mi
Nun dezerte gapas nur ruinoj. —
Jes, amata, tion faris vi.

ne demetante ĉenojn
tra pordoj brufermitaj
laca mi estas
eksidi mi deziras ĉe tablo via
ni ja nin konas
de la Kristnasko
tre laca mi estas senhomiĝinta
mi devas al vi rakonti
pri mi pri vi
mi deziras al vi diri
ke ne estas sekreto
ne atendu

El pola: Isaj Dratwer


SURVOJE AL LA SESHORA LABORTAGO

Arvid G. Hansen verkis norvegan artikolon en la sveda fakrevuo *Grafia* kun la titolo de "6-timersdagen — en utopi eller et realistisk historisk perspektiv?". Surbaze de la nomita artikolo jen iom el la historio de la klopodoj al la, jam ekbriletanta celo.

La gravaj industriaj landoj jam realigis aŭ estas realigantaj la 40-horan laborsemajnon; la soveta 7-jara plano kaj la planoj en Usono, Kanado, Novzelando, Skandinavio jam preparas sin al la sekva paŝo, al la 6-hora labortago (laŭ 5-taga laborsemajno).

La unua voĉo, kiu soniĝis por tiu ideo, ne aŭdiĝis ĵus... sed antaŭ preskaŭ 450 jaroj (1516), kiam *Thomas*

More, lordkanceliero en la plej mal-luma tempo de Anglujo verkis sian romanon pri "la lando Utopio", t. e. pri la lando, kie estas ĉio alimaniere aranĝita ol en la regno de Henriko VIII. Tiu imagita lando estas ideala ŝtato, socio kun demokrataj kolektivistaj principoj, plejparte enviinda ankaŭ en la nuno. En tiu ŝtato la socianoj laboras nur dum 6 horoj el la 24 (kun duhora manĝpaŭzo kaj kun komforta eblo de 8-hora dormo ktp.). La reala bildo estis kruelo, subpremo, pariigo kaj mortigo dum 38-jara regado de unu el la plej kruelaj tiranoj de la historio. Ĉu la revo de *More* estis nur eskapo en la ombro de la pendigiloj? Sendube ankaŭ tio, sed samtempe diveno kaj genia vojmon-



V. Brozik:
Komenius

LA POSTSIGNOJ

Premiita novelo en Pollando ("Nowa Kultura" — revuo anoncis la konkurson.) Profunda humanismo karakterigas la junan aŭtoron, favorantan E-on.

Li arestis ilin sur malriĉa placeto, kie paŝtis sin kaprij. Li arestis ilin laŭ modelaj principoj de la arestarto. Li ekkriis: Haltu! Manojn supren! Turnu vin posten! Falu! . . .

Tenante la pistolon pafpretan, li alpaŝis ilin, ĵetis malŝatan rigardon sur iliajn dorsojn kaj komencis ligi la manojn de la arestitoj per flava, kupra drato. La drato ne sufiĉis por ĉiuj, do, la manojn de Ludvika li kunligis per forta, nigra laĉo. Poste li ekkaptis ĉiun ĉe la kolomo kaj ilin starigis. Li ekkriis: Marŝu! La kapojn malsupren!

Li kondukis la arestitojn antaŭ si en direkto al la konstruoplaco. La pistolon li havis ĉiam pafpreta. Kondukante la arestitojn tra la senhoma laborplaco, li serĉis konvenan muron. Li trovis ĝin en angulo de la ruĝbri-

ka masonitaĵo. Li starigis ĉiujn ĉe la muro; li estis pafonta dorsen.

Ludvika eluzis disnodigon de la laĉo, liberigis siajn manojn kaj ekmanĝis elpoŝigitan bulkon.

— Ludvika, ĉesu manĝi! — ekkriis la pafonto kaj minace skuis la pistolon. Ludvika rapidmove enpoŝigis la ekborditan bulkon, le manojn metis dorsen kaj mallevis la kapon.

Antenon! mi komencas ĉe Kubalski — li ekvokis kaj direktis la pistolon al la dorso de la arestito staranta maldekstre. Mallaŭta pistolklako. Kubalski kurbiĝis kaj kuŝigis sin sur la flavan sablon. Ree aŭdebligis la pafsono kaj la sekva arestito kuŝigis sin ĉe la muro. La pistolo klakis la trian fojon; sed la arestito ne falis.

— Kotula! — ekkriis la pafanto — vi estas mortpafita, kial vi staras.

— Ha — ekmurmuris Kotula kaj falis surteren.

— Gapulo — ekkriis la pafanto.

Sekvis silento. Devis okazi plua pafo, sed pafo ne sekvis.

trilo pri kaj al malproksima mondo.

Post More, la granda Komenius, la universala sciencisto de la ĉeĥoj, i. a. pioniro de la internacia lingvo, en la jaro 1638 skribis jene en sia libro pri "La granda instruo":

"La natura tago havas 24 horojn kaj el ili 8 horoj apartenas al la dormo, same multaj al la eksteraj okupoj (. . . manĝo, amuzoj . . . amika konversacio) kaj fine 8 horoj al serioza laboro, kiun oni volas plenumi kun plezuro sen laciĝo. Devus do ĉiu semajno, dum kiu la sepa tago restas tute al la ripozo, enhavi 48 laborhorojn."

Post kelkaj aliaj similaj eldiroj dum la sekvaj jarcentoj Novzelando montris unue la vojon jam en 1840, kiam la 8-hora labortago iĝis realaĵo por la konstrulaboristoj, dank' al la (angla) enmigrinto Samuel Duncan Parnell (1810—1890). Sed la postulo eklaŭtiĝis ververe antaŭ ĉ. 100 jaroj — en Usono kaj rezulte de ĝenerala striko de 200.000 laboristoj ĝi iĝis realaĵo (1886) ne sen viktimoj.

La jarcentoturno ektransformis la mondon kaj ni iras antaŭen sur la vojo, kiun Komenius, More kaj aliaj steloj de la klero ekmontris al ni.

AMLITERATURO

La amliteraturon oni povas dividi en tri ĉefajn sekciojn. Unue, ekzistas ĉi tiu granda klaso de literaturaj produktaĵoj de ĉiuj nacioj, kiuj pritraktas la rilatojn inter viro kaj virino ĉefe laŭ spirita kaj intelekta aspektoj kaj en kiuj la plej intimaj fizikaj rilatoj estas nur sugestataj aŭ preterpase menciataj. Due, ni havas la vere konsiderindan amason de erotika literaturo kun abundo da seksaj detaloj, kvankam ĉi tiuj priskriboj kutime restas subgradaj al la ĉefa rakonto. Fine, ekzistas la amaso de tiel nomata pornografia literaturo en kiu la seksaj detaloj estas ĉefa kaj kutime la solaj temoj kaj en kiu la intenco ofte estas vekti nur volupton, la scenoj estas konstante pliigataj per rakontoj de diversaj perversaĵoj kaj kapricoj de la seksa instinkto.

Konsiderante erotikan literaturon el vidpunkto de literaturo merito, la kriterio estas, ĉu la verko kiel tutaĵo donas estetikan kontenton kaj ne nur voluptan stimulon. Plena estetika plezuro implikas elementojn de fizi-

ka krom intelekta, spirita kaj emocia reagoj, kaj povas esti ke pro la altigo de la fizika reago la skribaĵo aliĝas al la kategorio de "artverko", same kiel pro la altigo de la spirita aŭ intelekta reagoj; sed verko, kiu stimulas nur voluptan intereson aŭ deziron kaj entute ne donas estetikan kontenton, estas pliĝuste de medicina, psikologia kaj antropologia ol literatura interesoj. Kvankam ekzistas tika literaturo povas esti nomataj malpureco de pornografia literaturo ĝenerale, estas ĉiam disputinda afero ĝis kiu punkto certaj sekcioj de erotika literaturo povas esti nomataj malpuregaj. Estas klare ke gradoj de malpureco varias de jarcento al jarcento kaj de nacio al nacio kaj sekve ni trovas librojn, vortojn aŭ sekciojn, kiuj estus klasigitaj kiel malpuregaj dum unu tempo aŭ en unu loko, sed kiuj estus pli poste konsiderataj liberaj de iuj malŝatindaj trajtoj.

En Anglujo antaŭ 1868 la kriterio de malpurega verko estas pliĝuste ĝia intenco ol ĝia enhavo; se ĝi estas

Anstataŭ la pafsono la arestitoj ekaŭdis malpaciencon voĉon de la ekzekutanto: la pistolo malfunkciigis.

— Malfunkciigis? — ripetis unu el la arestitoj — domaĝe...

— Kaj kio okazis? — demandis la alia zorgavoĉe — sed eble oni sukcesos ripari ĝin.

Post momento ĉiuj starantaj ĉe la muro proksimiĝas al la ekzekutanto. Ekstis vigla interparolo, ŝutiĝis saĝaj konsiloj, tiel ke post nelonge oni sukcesis ripari la pistolon. Ludvika, kiu ne supozis, ke tiel rapide oni suk-

cesos refunkciigi la pistolon, denove ekmanĝis la bulkon.

— Ludvika, ĉesu manĝi — ekvokis la ekzekutanto — ĉiuj al la muro!

Ree klakadis pafoj. Starantoj ĉe la muro kuŝigis sin sur la sablon. De la lasta pafopereis Ludvika: antaŭ morto ŝi ne sukcesis formanĝi la bulkon.

Mi estis preteriranta. Kaj min atingis kuglo el la ligno pistolo de lernanto en la unua klaso. La kuglon mi portas ĝis hodiaŭ en la koro.

El la pola: *Walery Wiecko*
(Bydgoszcz)

"kalkulata ŝoki la senton de dececo" en bonreguligitaj mensoj. Tamen pli poste oni emfazis la fakton, ĉu la diskut-materialo povas tendence "malvirtigi kaj malpurigi" tiujn, kies mensoj povas esti malfirmaj al tiaj influoj kaj en kiujn manojn tia eldonaĵo povas fali.

Pro la influo de religia, leĝa kaj ofte eĉ de medicina opinioj oni nur iom post iom rekonas la sciencan valoron de erotika kaj pornografia literaturoj. Kiel oni povas atendi, seksaj manifestoj ĉiam interesis la homaron kaj la misteraĵoj, kunligitaj kun la seksa impulso estis portretitaj

en literatura kaj bilda formoj de la plej fruaj tempoj. Aŭtoroj de literatura distingo en ĉiuj landoj ofte verkis erotikaĵojn, kvankam ne estas kutime por tiaj provoj trovi lokon en iliaj kolektitaj verkoj. Tiaj libroj kiel Goethe "ROMAJ ELEGIOJ", liaj "VENECIAJ EPIGRAMOJ" aŭ "LA KORO DE LA MONDO" estas bone konataj, kiel de Schiller "VENUSVETURILO", de John Wilkie "ESEDO DE VIRINO" aŭ de A. C. Swinburne leteroj aŭ liaj kontribuoj al "LA WHIPPINGHAM JURNALOJ".

(Daŭrigota)

Pál Gombó:

Jenö Heltai (1871—1958)

Kiel oni devas progresi

La vento kaj la suno

P. Gombó kultas la bestfabelojn en la hungara literaturo kun surprizaj efektoj.

En la kazino de la ĉevaloj en B. oni diskutas arde, kiel oni devas progresi. Precipe fajre diskutas la draŝĉevalo kun la kurĉevalo.

La unua diras:

"Progresi oni devas kompreneble rondire. Ronde — ronde, ĉiam dekstren."

Dume la alia insistas:

"Ne gravas, ĉu rondire aŭ rekte, sed kuri kuregi, kiel eble plej rapide.

Fine oni petas la prezidanton de la kazino por decido. Li hufbatas trifoje kaj deklaras sian opinion.

"Kiel ajn oni povas, galope aŭ trotte, estas nur grave: halti ĉe ĉiu drinkejo."

Ĉar ĝi ja estis ŝarĝĉevalo.

El la hungara: *J. Némethy*

Iam la vento kaj la suno diskutis, kiu el ili povus preni pli rapide de la ŝultro de migranto lian mantelon.

La vento furiozis, sed la junulo despli obstine involviĝis en sian mantelon.

La suno ardis, loge ridetis, sed la junulo ekfrotis sian ŝvitoplenan frunteton, kaj indiferentis.

La vento kaj la suno senkonsile rigardis unu la alian, dum la junulo eniris en apudŝosean drinkejon. Kiam li elvenis, li ne plu havis mantelon. Li fordrinkis ĝin.

La konkurson gajnis la drinkej-mastro.

El la hungara: *F. S.*



LIBRO-KULTURO

Monumenta verko el Urugvajo

FERMENTARIO, verkita de d-ro Carlos Vaz Ferreira, trad. el la hispana de prof. Manuel Fernández Menéndez. Kun biografio kaj portreto de la aŭtoro, antaŭparolo kaj glosaro de la tradukinto. La elegantan, belan, facilstilan verkon eldonis: Urugvajja Esperanto-Societo, Montevideo. Formato 21x15 cm, 264 p. Prezo: 11:50 sv. kr.

Fermentario metafore signifas ideojn vivajn dum ilia kristaliĝo. La ideoj kristaliĝis en la granda intelekto de la urugvajja filozofo, D-ro C. V. Ferreira, kiu ĵus (antaŭ 2 jaroj) en aĝo de 87 jaroj forlasis la vivon kaj funebriĝis sian tutan nacion kaj la tutan intelektan mondon, kies eminenta inspiro li estis. La lumaj kaj lumigaj pensoj de la granda filozofo nun aperis en eminenta, klara kaj ĝusta traduko de prof. Manuel Fernández, kiu kune kun siaj helpantoj, d-ro I. C. Porto Carreiro Neto kaj I. G. Braga sukcesis adapti sin al la belega stilo de la verkisto, kio diras tre multe.

La verkon oni konsideras en Urugvajo — kaj plenrajte — kiel gravan mejloŝtonon kulture. En ĝi tiom abundas la temoj kaj pensoj, ke nur ilia registrado plenus la recenziĝan spacon. Liaj ideoj ne toleras ian enskatoligon sub iu rubriko. Sed oni povus trovi multajn mallongan karakterizon pri li: moralisto altgrada, socia reformemulo, samtempe individuisto, kiu povas trovi la ĉblan vojon inter tiuj du ĉefaj ideoj. Menso, kiu okupis sin pri la plej diversaj ideoj kaj detaloj de la individua kaj socia vivo: de la pedagogio ĝis la virinaj rajtoj, pri la racio kaj pri la kontrasto de ĉiu racio: la morto, kaj la instinkto de la senmorteco.

En tiu ĉi mirinda abundo de la pensoj revenas ofte la temo de la optimismo pri kio oni trovas vere amuzan kaj akrevidan ĉapitron (La efiko de la optimismo. P. 107), kaj grandiozan traktaton en la lasta ĉapitro: "Kia estas la morala signo de la homa maltrankvilo?", kiu analizas mem la signifon kaj du sencojn de ambaŭ vortoj, optimismo kaj pesimismo. La tuta ĉapitro estas tiel perfekte konciza ke estus vane provi eĉ resumi ĝin. Sed kiel tipan ekzemplon pri la granda verkisto kaj pedagogo, ni citas la lastajn vortojn de la libro, la deklaron de granda humanisto:

"... estas nur direkto de ideoj kaj sentoj, kiun mi rekomendas al vi, almenaŭ kiel spiritan ekzerciĝon. ... eĉ se tiuj ideoj kaj sentoj alportus nenian konsolon, ili devas instrui nin kompreni la veran sencan de la homa trankvileco — ne aldoni al la neeviteblaj doloroj kaj hororoj la doloron kaj superegan hororon de la morala pesimismo."

Se Esperanto estas vere elitmovado, multaj studos la verkon de la granda urugvajja vcremulo.

F. Szilágyi

GAZETARO

SUDA STELO nia simpatia fratrevuo unuigita kun *Prometeo* aperigis pasintjare kunigitan grandan numeron kun tre varia enhavo, altnivelaj artikoloj kaj kun grava novaĵo: bibliografia rubriko pri la gravaj artikoloj de la esp. gazetaro. Ni mencias ĉi tie, ke mi plezure peras abonojn. Jarabono: sv. kr. 7:75, (22 steloj).

La unua (sveda) numera de la "*PACO*" (abonpr. 6: — kr. jare) estas antaŭ ni. El la tre varia n-ro ni mencias kelkajn titolojn: Defendi la pacon (Kvist), Pacvojoj en la antikva tempo (G. Martinsson), Ĉarto de la paco (J. Skala), Japanio — bazo de agreso (A. Veršinin). Beletraĵoj (Thorsen), diskutoj, recenzoj, ŝercoj abundas. La revuo aperas ĉiumonate en alia lando.

THE BRITISH ESPERANTO okupas sin ĉefe pri la kongreso estonte en Harrogate kaj i. a. enhavas interesan artikolon pri la agado de la honora patrono, la Nobel-pacpremiito Lord Boyd-Orr.

L' ESPERANTO, la itala organo, okupas sin en la n-ro 66 vaste pri la vivo kaj faroj de la karmemora prof. G. Canuto.

NOTO PRI "SUDA STELO"

Jus ni ricevis la informonj ke la "*Suda Stelo*" aperos de 1961. en kvar ampleksaj numeroj. La abonprezo ekster Jugoslavio estas la supre menciita kaj nia administrejo peras abonon de la rekomendinda revuo.

Drago Kralj: Kvar prelegoj pri la Esperanta literaturo (eld. Slovenia Esp. Ligo, 193. p. Prezo ne indikita).

La enhavoriĉa libreto estas rezulto de pri-laboro por prelegoj, kiujn la verkisto prezentis dum la Instruista Seminario en Polzevo (Jugoslavio) 1959. Li dividis la historion de nia lingvo en 4 periodojn: 1) Lingvo kaj literaturo ĝis 1914. 2) E. poezio dum la milito, 3) E-poezio post la militoj, 4) E-prozo post la unua mondmilito ĝis hodiaŭ. La verkisto volas per tio krei samtempe lernolibron, vojmontrilon "sur malmulte konata, relative vasta tereno de nia t. n. originala literaturo." La plej granda parto okupas sin pri la poezio, en la kvara prelego li eksporas la prozan literaturon. La superrego de la poezio estas tamen nur ŝajna, ĉar el prozaj libroj ne estas citaĵoj en la libro, dum la poezio estas plena de celtrafe elektitaj specimenoj, kiuj estas vere ekstra donaco de la verko, kaj per tio oni povas pli facile sekvi lian rezonadon, kiam li prezentas la grandajn pintfigurojn de nia literaturo kiel Baghy, Kalocsay, Szilágyi, Schwartz, Engholm aŭ el la nova generacio la Kvaropon, kie jam aperas la libera versado pli amplekse, kaj atingas fine ĝis niaj novaj steloj Boulton, Baldur Ragnarsson kaj Thorsen. La lasta ĉapitro havas la titolon "De romano al novelo"; ĉu tio signifas, ke manko de spaco donas pli grandajn eblojn al la eldono de noveloj? La aŭtoro ne donas respondon je tio. En tiu parto li analizas komence la verkojn de Baghy, Engholm, Schwartz kaj finas per Rosbach kaj Szilágyi. Ĉe la laboro de la du svedoj li denove memorigas pri la "Malgranda Revuo" kaj mencias altetakse "Norda Prismo"-n, entute taksante ĝuste la tutan gravon de la unuopaj E-gazetoj kaj revuoj. Aparte li pritraktas niajn titolojn kaj la E-an fakliteraturon.

La valoro de la libro kiel enciklopedio estas pligrandigata per kroniketo de la "signifaj" jaroj kaj per indekso. Kelkaj detaloj ne estas atingeblaj, kelkaj ne estas ekzaktoj, sed pri tio ĝenerale la verkinto ne estas respondeca, sed la pli malfacila atingeblo de tiaj datoj.

Mi dezirus ioman disigon laŭ la prelegoj ĉe la lokoj, kie mem la verkisto respiras iomete, antaŭ ol li komencas novan parton.

Teodoro Julin

Petar Giunio: SEKRETOJ DE LA MAR-ESTAJOJ. Reverkita de Lic. Marinko Givoje. Eld. Kroata Esp. Servo, Zagreb, sub la ausp. de UEA. Form. 15x22,3 cm. 144 p. 73 (parte plurkoloraj) bildoj. Prezo: 7:— sv. kr. — Mendebila ĉe ni, ĉe la nomita organizo, ĉe UEA aŭ en popoldemokratioj ĉe la ŝtataj liberoperaj organoj.

En ĉiu rilato simpatia libro aperis sur la merkato kaj ĝiaj temo, stilo kaj kvalito nepre logos multajn legantojn, kiujn, same kiel la verkinton "regas forta deziro ekhoni la maron kaj senvualigi ĝiajn sekretojn".

Tiu ĉi serioza kaj samtempe ekscite interesa libro estas en sia tuto — ferio. Io alia kiel niaj kutimaj labortagoj, ĝia medio estas la maro kaj la marbordo, al kiu oni sopiras kaj el kies drama vivo la libro donas en eleganta stilo, abunde ilustritajn interesegajn ĉapitrojn, kiujn oni legas, kvazaŭ oni legus beletran verkon kaj post kies legado oni sentas sin kontenta. Parto de la kontenteco ligas sin al la medio, kie ni ferias aŭ feriiis, sed pli grave estas, ke oni ricevis natursciencajn instruon en plezura maniero de inteligenta verkisto kaj same inteligenta reverkinto, kiu distingas sin ankaŭ kiel E-stilisto.

Aliloke de nia nuna numero la leganto trovas specimenan ĉapitron el la libro, kiu certe estos tre populara en tuta vasta Esperantujo.

F. Szilágyi

Avoto: Memuaro pri geografiaj nomoj

Jen principa, mallonga traktato pri la solvo de la problemoj, kiun efektive oni devos aranĝi. Al tiu definitiva aranĝo servos bone la klaraj distingo de Avoto. (Prezo: 2 respondkuponoj.)

Julio Baghy dankas

Ĝis definitiva aparta danko, pro ĵusa nova enhospitaliĝo nun per mallongaj vortoj kaj samtempe tutkore mi dankas al ĉiuj miaj amikoj de la amasajn esprimojn de simpatio al mi okaze de mia 70-jara naskiĝtago.

La Fremdultrafika Asocio (Budapest, Felszabadulás tér 5.) disponigas tri diversajn turismajn prospektojn pri la vario de la interesa apudnuba lando.

ISLANDA STATISTIKA VERKO HISTORIO KUN ESP. RESUMO

La Statistika Oficejo de Islando eldonis unikan (statistikan) verkon pri la unua popolnombro en Islando (1703). Post la 17-a jarcento la situacio de la loĝantaro tiama (ĉ. 50 mil homoj) ne estis brila; tuj post la citita jaro sekvis eĉ epidemio, vulkanerupcioj, tiel, ke daŭris 120 jarojn laŭ la tabeloj de la libro, ĝis la nombro de la popolo atingis la saman nombron por poste triobliĝi dum 130 jaroj. La antikvaj informoj estas mirige ekzaktaj. Nur sep personoj el mil ne estas indikitaj laŭ aĝo. Inter la tre interesaj (ankaŭ kulturhistoriaj) detaloj estas menciinda la fakto, ke tiutempa nombro de la t. n. bezonuloj (prizorgitoj) estis 15,5 %, dum ekz-e en 1920 la responda nombro estis nur 4,8 %.

La bele presitan 60-paĝan libron ĉiu interesiĝanto pri kulturhistorio kaj publika ekonomio, statistiko kun utilo povas uzi dank' al la esperanta kaj angla resumoj. Pro la antaŭe menciita ni dankas la Oficejon, reprezentitan en la verko per la nomo de sro Klemens Tryggvason, kun la espero, ke la utilo de la resumoj montriĝos ankaŭ rekte en leteroj kaj reagoj pri la eldono.

F. S.

Dek gvidprincipoj de la Oomoto-Movado

(kun la komentoj de Josua Sakurai.) La dek estimindaj principoj kun abunda kaj ekzakta komentado estas legeblaj nun en la eldono de la Oomoto Centra Oficejo, Kameoka, Kioto-hu (Japanujo). La 24-paĝa traktato (prezo 2 rk) donas kompletan bildon de la Oomoto-mondpercepto ne nur en religiaj rilatoj, sed klarigas ankaŭ ilian efikon al la fenomenoj de la politika, kultura kaj ekonomia vivo.

La Internacia Specimenfoiro en Barcelona

(Hisp.)

ankaŭ ĉijare aperigas *senpage riceveblan*, belegan Esp.-lingvan afiŝon (70x100 kaj 30x40 cm.). Belega ornamo de ekspozicioj. Petantoj menciū, en kiu ejo (vendejo, stacidomo ktp) la afiŝon oni povos vidi por servi per tio la propagandon de la foiro. Skribu tuj al

Feria Oficial e Internacional de Muestras, Negociado de Propaganda, Paseo de Maria Cristina, Barcelona — 4.

Rudolf Hromada

unu el la gvidfortoj de la ĉeĥa kulturmovado, lingvisto, tradukisto tre atentinda, ĵus jubileis (1960) sian 70-an jaron. Ni aliĝas per niaj sinceraj bondeziroj al tiuj de la ĉeĥa esp-istaro.

Luis Hernandez mortis

En la nova numero de la bela kaj simpatia "Boletin" ni trovis la konsternan apartan sciigon pri la forpaso de la eminenta kulturbatalanto de nia movado en Hispanujo.

Ni komencis intence tiun ĉi funebran sciigon per mencio pri la bone redaktita hispana gazeto, ĉar ankaŭ ĝi estas unu el la fondiĝaĵoj de Luis Hernandez, lingva spertulo, literaturisto, longe redaktoro, eksmembro de la Juĝa Komisiono de la Belarta Konkurso kaj i. a. peranto de hispanlingvaj ĉefverkoj al Esp. — Ne nur la hispana movado, sed la tuta E-istaro sincere funebras. Unu el la bonaj fortoj forlasis nian rondon.

Eksdirektoro mezlerneja Ludoviko Király

unu el la plej bravaj pioniroj kaj veteranoj de la hungara movado, 72-jara, la 10-an de jan. 1961. mortis. Kondolencan al la funebranta familio kaj al la Miskole-aj E-istoj.

Junular-gastejo en Fredericia

(Danlando)

faris gravan paŝon por akceli E-on kiel internacian kompenilon por la migrantoj. En 1960 ĝi fariĝis en Danujo la unua E-junul-gastejo de la mondo kun la nomo "POR PACO", same kiel "Mjölfjell" en Norvegujo. Vizitu tiujn lokojn post la kongreso, propagandu, ke ankaŭ en via lando okazu similaj iniciatoj, instigu firmojn eldoni broŝurojn en Esp, kun la frontpaĝa indiko: "Esperanto". Eltranĉaĵojn kaj broŝurojn sendu al Lernejestro Stig Hansen, *Lundtofte*, Danlando, kiu informis nin pri la supraj aferoj kaj — ankaŭ pri tio, ke lia 7-jara filo kolektas poŝtmarkojn. La alvoko de la patro pretendas seriozan pripenson, la filatelista fileto meritas same aktivan subtenon.

S.

E-literaturon ĉiuspecan, ĉiutempan interes. tutmonde, ankaŭ kontraŭ germana: Willi Giese, Rupprechtstr. 19, Berlin — Lichtenberg 4, D. D. R./Bonvolu oferti, ĉiam resp.!

kies alta protektanto estas Lordo Boyd-Orr. Nobelpacpremiito, kaj kies grava okazaĵo estos i.a. la Arta Festivalo anoncas konkurson pri propaganda afiŝo. Limtempo: 30/6, 1961. Petu informojn laŭ la supra adreso.

Enketo pri la migrado de la kukoloj

La eŭropa kukolo (*Cuculus canorus L.*) dumsumere vivas en preskaŭ tuta Eŭropo kaj en okcidenta Azio, kaj vintre en tropika kaj suda Afriko. Ĝi estas speciale fama pro la printempa krio de la virseksulo: "ku-ku". Ankaŭ ĉiu scias ke ĝi ne faras propran neston, sed kovigas siajn ovojn per aliaj birdoj. Venante el Afriko printempe ĝi atingas sudan Eŭropon fine de marto, nordan nur fine de majo.

Estus interese scii kiam la unua kukolo aperas en via loko. Se vi vivas eksterurbe kaj do povas sekvi tagon post tago la alvenon de tiu birdo, bv. havigi al la ci-suba adreso jenajn informojn pri

a) nomo de la loko kaj situo rilate gravan urbon, b) dato de la alveno de la unua kukolo, c) aspekto de la regiono, d) (se eble) veterkondiĉoj dum la pasintaj tagoj, e) via nomo kaj adreso.

La rezultoj de ĉi tiu enketo en scienca E-artikolo aperos kun la nomoj de la informintoj. Eble ĉi tiu enketo havos favoran influon en kelkaj sciencaj medioj. Adreso: W. De Smet, Graaf van Egmontstraat 16, Antwerpen (Belgujo).

Redaktora poŝto

Ni ŝuldas reciprokajn bondezirojn al multaj letterskribintoj. Sen mencio de nomo bv. senti persone nian dankemon. El la karto de s-ino C. Hueter ni volonte citas frazon, (kiu cetere ne estas la sola tre bonvola opinio esprimita en letero): "Estas ĉiam ĝojiga momento, kiam alvenas via mirinde bela kaj interesa revuo..." Same ni dankas nian svedan amikon en R-landa, kiu afable peris simile belan opinion pri N. Pr. Okaze ni respondos aparte. La aŭtoro de "Bela esto" afable pardonu pro neevitebla plua atendigo. Dankon pro la tradukoj de L. S.

La Belgia Fervojo konsentis rabaton da 25 % por ĉiu kongresano, individue. Dum la kongreso okazos pluraj interesaj aranĝoj, i. a. por sport-amatoroj. Postkongresa sciamano estos organizata de la Lieĝa SAT-Amikaro en Valonio. La Junularo elektos baldaŭ sian kunvenlokon por la postkongresaj tagoj. Aliĝu jam nun! (SAT. Av. Gambetta Paris 20e.)

Radio-programoj de la voĉo de ameriko en esperanto

17/3, 24/3, 31/3, 7/4 1961

03.30—04.00 GMT 16.92 m. 17735 kvs
19.83 m. 15130 kcs

(horsistemo de Greenwich)

ĉefe por Ameriko

11.00—11.30 GMT 41.92 m. 7155 kcs

ĉefe por Orienta Azio

12.00—12.30 GMT 19.72 m. 15210 kcs

ĉefe por Sudorienta Azio

22.00—22.30 GMT 31.20 m. 9615 kcs

48.62 m. 6170 kcs

ĉefe por Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Azio kaj Afriko.

Ĉiu elsendo estos aŭdebla ankaŭ en aliaj partoj de la mondo. Bonvolu atenti, ke la disaŭdigo de 03.30 GMT estas aŭdebla en la amerikaj landoj en la nokto inter jaŭdo kaj vendredo, sed ke la aliaj disaŭdigoj atingas la aŭskultantojn en la regionoj menciitaj en la nokto inter vendredo kaj sabato.

Raportojn pri la ricevo, opiniesprimojn pri la enhavo kaj demandojn por la rubriko de Demandoj kaj Respondoj bonvolu sendi al D-ro William Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528 HEW, Washington 25, D. C., Usono.

Esperantista kulturdomo

(Kastelo "Gresillon" — Baugé (M & L.) Francujo aranĝos paske (23/3—5/4) kaj de la 20-a de junio ĝis la mezo de sept. kursperiodojn (6). Petu informojn laŭ la supra adreso.

Mondkoalicio kontraŭ la vivsekcio

protestas kontraŭ la troigaj vivsekcioj de bestoj. Informas: *Gazetarserva — kaj propaganda-sekcio de "World Coalition against Vivisection"*, Cornelis de Wittlaan 45, Hago — Nederlando.

INFORMO EN LUKSA FORMO. La germana informa organo reeldonis la lerte redaktitan kaj tre elegantan 80-paĝan libron, (kongresdokumento en Mainz.) La libro enhavas aktualajn (1960), koncizajn, klarajn ĉapitrojn pri geografio kaj ĉirilataj temoj, pri politiko, ekonomio, sociala vivo, kulturo, kun historia tabelo. Ankaŭ ĝia bildmaterialo estas bela, ilustra kaj klariga. Koloraj mapoj k. c. troviĝas en la bela libro, senpage ricevebla de Presse- und Informationsamt der Bundesregierung Welckerstrasse 11, Bonn (Germanujo).

NOVA GRAVA ESPERANTO-INSTITUCIO EN HUNGARUJO. Post longaj traktadoj mi povas informi vin, ke en la urbo Szeged estas fondata, la *Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko*.

Mi forte kredas, ke ankaŭ vi kara leganto komprenos la signifon de nia nova instituto kaj se vi povas certe volonte apogosi ĝin per libro-, gazetdonacoj. Jen la adreso: Hungarl. Esperanto-Biblioteko, SZEGED, p. k. 441, Hungarujo.

Kolora il. p. karto de la palaco, kie troviĝas la Muzeo kaj Biblioteko, estas mendebla kontraŭ int. rk ĉe Prof. Ernő Farkas, Szeged, Lengyel u. 13. Hungarujo.

SZEGED KAJ KOMITATO CSONGRAD. 20 paĝa riĉa ilustrita esperantoprospekto pri tiu historie interesa regiono el la hungara ebenaĵo. Gratulu al la eldonejo: Fremdultrafika Oficejo, Szeged, Klauzál tér 7. Hungarlando. Prezo 1 resp. kupono. Havebla ĉe Esperanto grupo Ságvári gimnazio Szeged, Hungarujo.

ANTAŬKONGRESO EN LONDONO kaj **SEMINARIO "ORIENTO-OKCIDENTO"**. Informoj estas riceveblaj de *Victor Sadler*, 1 Poet's Road, Highbury, London, N. 5.

Ni intencas estigi leterkontakton inter E-istaj difektologoj (instruistoj de mens-, vidoreldifektaj infanoj) por interŝanĝi spertojn, metodojn ktp. Adreso: Rézsó Pál, Kisujváros, Gyógypedagogia (Hungarl.).

Enigma-konkurso

Solve por la enigmo en 4/1960: Mankas mono, mankas homo. Gusta solve ne alvenis. (Al la sekva despli multaj, rezulto en la venonta n-ro.)

Nova tasko: Miksu laŭplaĉe la literojn de *januaro-februaro* formante tiom da vortoj, kiom vi povas. Unusilabaj vortoj ricevas 1 poenton, dusilabaj 2, ktp. La plej multaj poentoj rezultos libropremion. Limtempo: 1/4, 1961. Sufiksoj nur kun finaĵoj konsideriĝas kiel memstaraj vortoj.

Latva studento, 20-jara deziras korespondi kun ĉ. l. pri ĉ. t. Aris Smildzini, Str. Daliju 14—1. *Riga* 2. Latvio. USSR.

Mi deziras korespondi kun svedaj esperantistoj, bonvolu skribi al Elena Romza-Sucharavo, Domov I—412. *Svitnad* Fatrami. Ĉeĥoslovakio ĈSR.

KIU

jugoslava esp-isto scias la adr. de *Dimitriju Toader* (lasta konata adreso: Ozdin 515. Banat). Bv. respondi al *J. E. Dathyn*, Dr. Mulderstraat 14. *Zaandijk*, Nederlando.

Hu Guozhu, Guoying, Zengzhou Di 6. Mian Fangzhichang. Cinio, 24-jara esp-isto dez. kor. pri Esperantologio, ricevi E-librojn kaj gaz. Rekompence sendos bk aŭ bildalbumon de ĉinaj artistoj.

Ĉina minej-ingeniero kor. pr ĉt., interesiĝas pris E-libroj, gazetoj. Adreso: Gau Jij, Hebiurbo, Henan-provinco, Ĉina Popola Resp.

El letero: "Mia nomo estas Mundukoviĉ Zdravko. Mi havas 12 jarojn. Du monato mi lernas Esperanto. Mi estas lernanto..." La eta nova esp-isto kun filatelijaj kaj il-pk-interesoj volonte priskribos ankaŭ al vi sian urbeton en la valo, ĉirkaŭitan de verdaj montoj, kaj iom post iom (kun via helpo) li estos bonega E-isto. Jen lia adreso: Mundukoviĉ Zdravko, Slav. Pozeĝa, I. L. Ribara 18-a (Hrvatska) Jugoslavio.

Sro Hartmut Werdermann (21a) *Selm* in Westf. (Germ). proponas estigon de salutorganizoj diversloke. La propono estas ekster nia celfikso kaj spaca eblo. Tial ni donas lian adreson al la leganto kun la rimarko, ke la propono servas por la "imaginaria" partopreno en la jaraj kongresoj, kiuj per tio iĝus eĉ pli imponaj.

**SE VI ANKORAŬ NE PAGIS
VIAN ABONON, BONVOLU
FARI NUN. DANKON!**

UTGIVAREKORSBAND

Norda Prismo

Barnhusgatan 8. Stockholm

Bilaga medföljer

NOVAJ STAFETO-LIBROJ

Eli Urbanova: Nur tri kolorojn (Prezento de J. Baghy (Poemaro) 140 p. Prezo: 5: 75 sv. kr.

John Francis: Vitralo (Novelaro kun prezento de F. Szilágyi). 136 p. Prezo: 7: — sv. kr.

Edmond Privat: Junaĝa verkaro (Prologoj de J. Baghy kaj K. Kalocsay) 144 p. 7: — sv. kr.

kaj du aliaj bonegaj verkoj (miniatura poezio):

Geraldo Mattos: Miniaturoj (Eld. Kultura Kooperativo, Rio de Janeiro) 78 p. 2: 50 sv. kr.

Poul Thorsen: PLUK (Eld. Dana Lab. Esp. Asocio,) 96 p. Prezo: 2: 80 sv. kr.
Mendu ĉe Norda Prismo!

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de Prof. G. Waringhien kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj aperas ĉiun duan monaton — 32/40 paĝa — poŝformata jare sv. kr. 6.— aŭ egalvaloro.

NORDA PRISMO
peras por la abonon

La unua Stata Mezlernejo en Suda Germanujo, kiu enkondukis Esperanton kiel instrufakon, festos ĉisomere sian dekjarian jubileon. Sendu materialon!


Esperantogrupo de la Stata Mezlernejo Burglengenfeld, Mittelschule 13 a *Burglengenfeld Opf.-Germanujo*.

Willy Breinholst

Ni en Skandinavio

kun la karikaturaj de Leon van Roy
Esperantigis: F. Szilágyi kaj Regina Emson.
Informiĝu ridante pri la skandinavianoj!
Prezo nur: Kr. 1:60.

Koko-libro — Aĉetinda!



Ankorau
troviĝas:

Homoj kaj riveroj (Rosbach)
Kr. 10: —

Mistero Minora (Szilágyi)
Kr. 10: —

Virino ĉe la landlimo (Boulton)
Kr. 11: 50

MENDU ĈE NORDA PRISMO!

JEN GRAVA VERKO FERMENTARIO

unu el la ĉefaj de la granda urugvaja pensulo Doktoro Carlos Vaz Ferreiro; el la hispana lingvo tradukita en Esperanton de Prof. Manuel Fernández Menéndez.

Eldonis: *Urugvaja Esperanto-Societo, Montevideo (Urugvajo)*.

Formato 21x15; 264 paĝoj; bona papero; bone bindita per kartoneto kun bela kovril-desegno.

Prezo: US dol. 2.00 (du dolaroj), 11: — sv. kr.

LA SEKRETA POTENCO MALANTAŬ LA BATALILOJ

prelego de Martinus

Jen spiritscienca respondo al multaj el viaj propraj demandoj. Prezo: 2 int. rspk.

INFORMILO

4-kolora kajero, kiu donas elementan konon pri la spirita scienco de Martinus. Prezo 4 int. rspk.

La Spiritscienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej 94—96, Kopenhago F. *Danujo*.